

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

4


1994

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Fruktoj Foto de LI CHUNGENG

INTER NI

Kritikoj de legantoj

Kvankam ĝenerale bonkvalitaj estas viaj tekstoj, tamen kelkfoje

ĝenas la legadon pro la troa ripetado de vortoj. Tio aparte impresis min en artikolo titolita "Ĉinio Provas Sciencan Nutran Dieton" (n-ro 12, 1993). Tralegante ĝin, mi kalkulis, ke la vorto "mangaĵo"

aperis almenaŭ 22-foje, dum la rilata adjektivo pliajn 18 fojojn, kaj ene de komponitaj vortoj eĉ vidiĝis 3 pliajn. Certe Esperanto estas tre ŝpara lingvo en sia vortostoko kaj la sinonimoj maloftas, sed por eviti la ripetadon eblas konstrui similsignifajn vortojn per aldono de aliaj radikoj. Ĉi tiu efika rimedo por fari la tekston pli spica kaj malpli unutona estas pli grava ol oni povas supozi. Aliflanke, por fari la tekston pli malpeza kaj flua, ni devas laŭeble anstataŭigi la ripetigantajn substantivojn kaj adjektivojn per personaj kaj posedaj pronomoj.

**ISMAEL MATTOS
ANDRADE ÁVILA**
(Brazilo)

Mi deziras korekti artikolon, kiun vi aperigis en la rubriko "Kurantaj Aferoj", paĝo 49 de la lasta n-ro de 1993, mi legis en la rubriko "medicino":

"La Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo, kiu sukcesis replanti derompitan manon antaŭ 30 jaroj, refoje sukcesis replanti ambaŭ derompitajn kruojn. Antaŭ nelonge, ses junaj kirurgoj de la hospitalo replantis ambaŭ derompitajn kruojn al maljuna kamparano. Tio estis unuafoja en la mondo."

Tamen mi povas aserti, ke ilia operacio ne estas unuafoja en la mondo. Fakte antaŭ dek jaroj mi ricevis libreton de mia litova korespondantino titolitan "Por la Homo" skribitan de A. Urbonas kaj K. Treĉiakauskas. Tiu libreto rakontas la malfeliĉan aventuron de kamparana knabineto, kies du kruoj estis distranĉitaj kaŭze de meĥanika falĉilo (falĉomaŝino). Rusaj kirurgoj sukcesis tiaepoke replanti la du kruojn al la knabineto. Antaŭ kelkaj monatoj mi povis legi konfirmon de tiu afero, leginte malnovan ekzempleron de la rusa revuo "Sputnik" de februaro 1984 (la afero okazis je la 18-a de junio 1983).


CLAUDE PIERROUX
(Belgio)

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Mao Zedong inter la ĉinoj
- 6 Grandioza fervoja konstruo
- 8 Filma merkato en Ĉinio
- 10 *ĈINA KULTURO:*
Sanprotekta teorio de taoismo
- 12 *ESP-NOVAĴOJ*
- 13 *POR KOMENCANTOJ:*
Hejmenreveno de martestudo
- 13 *SENTENCOJ DE FILOZOFOJ:*
Teorio de sanprotekto
- 14 *VOĈO DE ESPERANTISTOJ:*
Ĉu akuzativo aŭ nominativo post la subjunkcio "kiel"?
- 16 Nova paŝo de junaj ĉinaj esperantistoj
- 17 Uŝuo — trezoro de la ĉina kulturo
- 20 *ĈE YANGZI-RIVERO:*
De Yangzhou al Zhenjiang
- 24 Kulturado kaj bredado en maro
- 25 *ARTOJ DE ĈINIO:*
- Nuntempaj Dongba-aj pentraĵoj
- 28 Longviveco ne estas revo
- 29 *SUR STRATOJ:*
La Nankina Strato en Ŝanhajo
- 32 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*
Pri krimado de ĉinaj geknaboj
- 36 Ekspedicio en dezerto
- 39 Fenestro de malnova domo (Novelo)
- 44 Subakva arkeologio de Ĉinio
- 45 *MEM PROVU*
- 46 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 48 *KURANTAJ AFEROJ*
- 50 *AMATOROJ:*
Yan Jiaxian, kolektanto de tuĉfrotujoj
- SUR LA KOVRILO:*
Aglo-bokso Foto de Liu Sigong
- 2 Fruktoj
- 34 Pitoreska Wuyi-monto
- 42 En foiro de floroj
- SUR LA DORSKOVRILO:*
Wuyi-monto

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Pekino (p. 6)
2. Ŝenzhen (p. 6)
3. Cangzhou (p. 17)
4. Zhengzhou (p. 17)
5. Taklimakan (p. 36)
6. Bama-gubernio (p. 28)
7. Lijiang-a Naŝi-nacia
Aŭtonoma Gubernio (p. 25)





Por rigardi la restaĵojn de Mao Zedong

JI PING:

MAO ZEDONG INTER LA ĈINOJ

LA 26-a de decembro 1993 estis la 100-a datreveno de la naskiĝo de Mao Zedong, unu el la ĉinaj gvidantoj. Por ia tempo malaltiĝis la entuziasmo por Mao, ĝi tamen denove varmiĝis en la lasta jaro en Ĉinio. Nun li estas respektata kiel revolucia gvidanto de la ĉina popolo, sed ne plu idolo.

ONI SVARMIS AL MALGRANDA MONTVILAĜO

Hunan-provinco, naskiĝloko de Mao Zedong, sendube estis unu el la gravaj lokoj por la celebrado de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Mao Zedong. La 26-an de decembro 1991, gvidantoj de Hunan-provinco okazigis en Shaoshan, hejmloko de Mao,

specialan kunvenon, en kiu ili decidis okazigi solenan memoradon en la 26-a de decembro 1993 en Shaoshan; eldoni libron pri studo de Maozedongpenso; konstrui tombejon por la 6 martiroj de la familio Mao en la ĉina revolucio. La 20-an de decembro 1993, s-ro Jiang Zemin, gvidanto de la ŝtato kaj la Komunista Partio de Ĉinio, propramane malfermis la ruĝan silkaĵon por la bronza statuo de Mao. La statuo kun alto de 6 metroj staras sur la placo antaŭ la memorhalo de Mao en Shaoshan.

Laŭ statistiko, la nombro de ĉinaj kaj alilandaj vizitantoj al Shaoshan kreskis de 270 000 en 1982 al 1.2 milionoj en 1992.

En Pekino, de post malfermo de la Memorhalo de Prezidanto Mao Zedong en la 9-a de septembro 1977,

ĝi jam akceptis entute 67 milionojn da vizitantoj, malfermiĝante 300-343 tagojn ĉiujare.

PLEJ ŜATATAJ MEMORAĴOJ

En la 90-aj jaroj denove aŭdiĝas en Ĉinio kantoj pri Mao, kiaj “La suno estas la plej ruĝa kaj prezidanto Mao, la plej kara” kaj “Nia gvidanto Mao Zedong”, kiuj silentis kelkajn jarojn. Nun oni havigis al tiuj kantoj laŭmodan ritmon, tiel ili estas ŝatataj ankaŭ de gejunuloj.

En la 60-70-aj jaroj portretoj de Mao pendis preskaŭ en ĉiuj ĉinaj hejmoj. En la 80-aj jaroj pentraĵoj anstataŭis ilin. Sed ili denove aperis post dek jaroj en multaj ordinaraĵoj ĉinaj hejmoj.

Pro respekto al Mao kaj por amatorado multaj ĉinoj konkure aĉetis memoraĵojn pri Mao, precipe tiujn, kiuj furoris en la kultura revolucio, kiaj liaj medaloj, statuoj, poŝtmarkoj, pentraĵoj, portretoj, fotoj kaj la ruĝa libreto “Vortoj de Prezidanto Mao”. En multaj turismaj magazenoj ili havas grandan debiton.

LIBROJ KAJ FILMOJ PRI MAO

En la entuziasma tajdo al Mao la gazetara servo ludis gravan rolon. Iu belarta eldonejo presis en 1992 murkalendarojn kun fotoj de Mao en diversaj epokoj kaj liaj poemoj. Ili estis facile disvenditaj. Kvankam oni eldonis pli ol dek milionojn da ekzempleroj, tamen ili ankoraŭ ne povis kontentigi la bezonadon.

Tiam sinsekve eldoniĝis biografioj de Mao Zedong kaj verkoj pri studo pri Maozedong-penso, ekz., “Mao Zedong, ne plu idolo”, “Mao Zedong ŝatas legadon”, “Biografio de Mao Zedong” ktp.

En la lastaj jaroj multaj ĉinaj filmo-studioj kaj televidaj stacioj faris filmojn kaj televidajn filmojn pri la vivo de Mao Zedong, kiaj “Soleno de la fondiĝo de la Respubliko” kaj “Majesta Kunlun-montaro”, kiuj akiris “Premion de Ora Koko” kaj “Premion de Cent Floroj”, la plej altajn premiojn de la ĉina filmorondo. Antaŭ nelonge oni projekciis filmojn “Mao Zedong kaj lia filo”, “Mao Zedong kaj lia samvilagano”, televidan filmoserion “En Ĉinio naskiĝis Mao Zedong” k.a. Tiuj filmoj prezentis la kreskon, batalon, laboron, lernadon, ĉiutagan vivon, kontaktiĝon kun aliaj, hobiajn, temperamenton kaj intereson de Mao Zedong kaj objektivite montras liajn brilajn meritojn.

POR ALTA IDEALO

En la nuna Ĉinio Mao Zedong estis ne nur granda homo, sed ankaŭ simbolo de granda spirito kaj alta idealo.

Iu veterana teoriisto diris, ke la entuziasmo por Mao Zedong ne estis farita de homoj fantazie. Ĝi manifestis la popolan volon. Pro tio ke oni objektivite rigardas Mao, sed ne prenis lin kiel dion aŭ sanktulon same kiel 10 jarojn antaŭe, kaj bone konis lian



La bronza statuo de Mao Zedong inaŭgurita

gravan rolon en la liberiga batalo de la ĉina popolo, oni refoje levis la ondon de la entuziasmo por Mao en Ĉinio.

Antaŭ la 100-a datreveno de la naskiĝo de Mao Zedong, iu redakcio de Pekino faris al 15 pekinaj kaj Hunan-aj altlernejoj enketon “Pro kio vi respektas Mao Zedong?”, “Kiel vi opinias pri Mao Zedong?” ktp. La demandoj plejparte estis studentoj naskiĝintaj post 1976.


Oni aktive respondis la demandojn. La respondoj estas diversaj, kiaj “Mi respektas Mao, ĉar li estis politikisto, milita strategiisto, filozofo kaj poeto”; “Mi respektas Mao, ĉar liaj 6 familianoj sin oferis por la revolucio”; “Mi respektas lian neflekseblecon kaj nesubigeblecon antaŭ la fremdaj fortoj”; “Li sinforgese laboris tage kaj nokte, sed lia ‘luksa’ ĝuo por manĝaĵo estis nur bovlo da frikasitaj porkaĵoj. Oni sentas lin simpla, intima kaj sincera. Pro tio mi estimas lin.”

Tiuj gejunuloj estimas Mao pro tio, ke en iliaj okuloj li estis ne sankta nek perfekta homo, sed ordinara homo, kiu havis ĝojon kaj malĝojon, talenton kaj mankon. Iuj el ili respektas Mao pro liaj apartaj kvalitoj. Ĝuste pro tio oni pardonis liajn erarojn.

Krome, oni rimarkis, ke multaj gejunuloj havas fortan aspiron al idealo, nacia spirito kaj heroa modelo. Tiuj specialaĵoj, enkorpiĝintaj en Mao Zedong kaj lia epoko, forte interesas ilin. Tion rezultigis eble ĝuste ilia malkontento pri mamonismo kaj ĉia perverseco, furorantaj en la nuna ĉina socio. ■

ZHANG WEN:

GRANDIOZA FERVOJA KONSTRUO



Traksternado sur la Pekin-Jiulong-a Fervojo

KVANKAM Ĉinio metis sian lastan vaporlokomotivon en muzeon, tamen ĝia fervoja transportado ne fariĝis facila. Male, ĝi fariĝis pli kaj pli ĝena afero. Pro tio Ĉinio devas kiel eble plej rapide plilongigi siajn fervojojn. Kompreneble, tio estas pli malfacila. Krom tio, ne estas alia rimedo por Ĉinio sin liberigi el fervoja komplikiteco.

Sekve, Ĉinio komencis serion da fervojaj konstruoj, el kiuj unu estas la Pekin-Jiulong(Ĝiulong)-a Fervojo.

LA PLEJ GRANDIOZA KONSTRUO

La Pekin-Jiulong-a Fervojo estas la plej grandioza el la fervojoj konstruataj en Ĉinio, kiu bezonas plej grandan investon. Pro tio ĝi estas rigardata kiel la plej granda kaj plej grava konstruo de la lando. Ĝi, inter la Pekin-Sanhaja kaj Pekin-Kantona Fervojoj, komenciĝas norde de Pekino,

iras suden tra 9 provincoj kaj municipoj kaj finiĝas en Shenzhen (Ŝengen) de Guangdong. Post kiam Ĉinio restarigos sian suverenecon super Hongkong en 1997, la fervojo rekte atingos Jiulong, distrikton de Hongkong. La fervojo kun totala longo de 2 538 km (inkl. tiun de la branĉaj kaj trunkaj linioj) estas alia fervoja arterio sterniganta de sude norden en centra kaj orienta Ĉinio.

Je mencio pri la fervojo, vicurbestro de Pekino Li Runwu (Li Jun'ŭ) diris: "Post finkonstruiĝo de la fervojo turistoj kaj importataj varoj povos rekte atingi Pekinon de Hongkong aŭ inverse. Tio havas gravan signifon por pordomalfermo de nia urbo."

La fervojo trairos pli ol 20 guberniojn de Jiangxi(Ĝjangŝji)-provinco, en kiu ĝi sin etendos 705.6 km, kiuj konsistigas 1/3 de la totala longo de la fervojo. Vicestro de la provinco Jiangxi s-ro Huang Zhiquan (Huang Ĝičjŭan) diris: "Ĝia konstruiĝo ne nur finos la senfervojan historion, sed ankaŭ

du malriĉaj regionoj kun 10 milionoj da loĝantoj en nia provinco, sed ankaŭ faros nian postgintan provincon granda fervoja trairejo, kiu kunligos la regionojn de Hongkong kaj Aomen kun la landinterno, orientan marbordon kun la internaj lokoj de centra kaj okcidenta Ĉinio.”

Videble, la konstruado de la fervojo havos ege gravan strategian signifon por mildigi streĉan transportadon de la sudo al la nordo, akceli pordomalferron de marbordaj kaj orientaj regionoj, disvolvi ekonomion de la malriĉaj regionoj ĉe la fervojo kaj perfektigi la fervojan reton de la lando.

ARDA BATALO POR LA FERVOJO

La 20-an de aprilo 1993 komenciĝis la konstruado de la Pekin-Jiulong-a Fervojo. Ĝi daŭros tri jarojn.

Ĝi transiros Yangzi-riveron, la Flavan Riveron kaj plurajn montojn. La komplikaj geografiaj kondiĉoj kaj geologia strukturo de ĝiaj trairetoj lokoj prezentas malfacilojn unu post alia al la konstruantoj. Statistikoj montras, ke por konstrui la fervojon oni devas starigi sume 549 grandajn kaj mezgrandajn pontojn kaj bori 126 tunelojn. Por la konstruado kolektiĝis pli ol centmil fervoj-konstruantoj.

La fama Wuzhishan(Ŭĝiŝan)-tunelo kun totala longo de 4 455 m estas la plej longa tunelo sur la fervojo. Wuzhishan-monto situas en Guangdong-provinco, kaj ĝia plej alta pinto estas 829 m super la marnivelo. La tunelo trairos plurajn faŭltojn larĝajn ĉ. unu m. Ĉe la du ekstremitoj de la tunelo estas 10-15-metraj eflorokaj tavoloj kaj ĝiaj en- kaj el-irejoj estas ĉirkaŭitaj de malfortikaj rokoj en la areo de centoj da m. La 2-an de majo 1993 komenciĝis granda konstruado de la tunelo.

Kiam mi venis al la tunela konstruejo de Wuzhishan-monto en la unua tagdeko de oktobro, mi vidis ardan scenon: En granda tunelo profunda je cent m tondras maŝinoj kaj navetas veturiloj. Mi informiĝis de teknikisto, ke en la konstruado oni rompita la rutinon. Ili faris kompletigon kaj fortigis laborkapablon. Ĝis la 17-a de oktobro, laŭ la plena sekco de la en- kaj el-irejoj de la tunelo jam estis boritaj sume 392.5 m, el kiuj 227 m estis finkonstruitaj.

La Okcidenta Pekina Stacidomo, startpunkto de la Pekin-Jiulong-a Fervojo, estos la plej granda el la 132 konstruotaj stacidomoj ĉe la fervojo, kaj ankaŭ la plej granda pasaĝera stacidomo en la centjara fervoj-konstrua historio de Ĉinio. Ĝia norda parto longos je 740 m de oriento al okcidento. Ĝi konsistos el ĉefa domo 12-etaĝa kaj akcesoraj domoj. Ĝia suda parto estos nur tiom granda, kvinone kiom la norda, tamen ĝi ankoraŭ estos duoble pli granda ol la nuna Pekina Stacidomo. Post plenumiĝo de la unuaj konstruadoj en 1995, tie povos kuri 60

paroj da trajnoj, kaj la pasaĝera transportado de Pekino kreskos je 50%. Krome, en la Okcidenta Pekina Stacidomo funkcios modernaj servoj, kiaj aŭtomata biletovendejo, aŭtomata disaŭdigo, halo kondukanta al la subtera fervojo, kaj subtera remizo kun areo de 50 000 kvadrataj metroj.

Novembre de 1993 falis granda neĝo kaj la temperaturo abrupte malaltiĝis. Ĝenerale dirite, tia vetero ne taŭgas por enpremi miksaĵon el cemento, sablo kaj ŝtonetoj. Tiam la laboro de enpremado de la bazo de la suda parto plenumiĝis duone. Se oni ĉesigus la laboron, aperus fendo sur la likimuna bazo kaj la fendo eble kaŭzus neimageblajn malutilojn. Kion fari? La konstruantoj decidis daŭrigi la laboron. Ili laboris en frostoj, kaj la ŝoforoj kondukis mortar-kamionojn pezajn je 20 tunoj sur la glacia vojo 5 tagojn kaj 5 noktojn.

DIVERSFLANKAJ HELPOJ

La Pekin-Jiulong-a Fervojo, grandioza konstruo atentata de la tuta lando, akiris subtenon de diversaj flankoj, precipe de diverslokaj popolanoj ĉe la fervojo.

Ter-rekviziciado estis ofte renkontata problemoj en fervoj-konstruado. Estis malfacile persvadi, ke la kamparanoj, precipe tiuj en la malriĉaj regionoj, forlasu siajn agroj kaj loĝdomojn. Kvankam la ŝtato kompensas ilian perdon, tamen iuj ankoraŭ ne tiel volontis. Ofte okazis, ke iuj marĉandis kun la ŝtato, aŭ aliaj neniel volis transloĝiĝi. Tamen, ĉi-foje, ne estis tiel multe da malfaciloj en la ter-rekviziciado kaj transloĝiĝo. Pluraj kamparanoj, ne ricevinte kompensan monon, volonte transloĝiĝis. Ĝis nun, por la fervojo jam estis rekviziciitaj 126 700 muoj da tero (15 muoj = 1 hektaro), t.e. 74% de la bezonata tero.

Kapitalo estas unu el la plej gravaj problemoj en fervoj-konstruado. Sen kapitalo oni povas fari nenion. Tiuflanke, la Pekina Fervoja Bankbranĉo sub la Konstrua Banko de Ĉinio donis al la fervojo rektan subtenon. Laŭ la nekompleta statistiko, la totala investaĵo por la fervojo estos 20 miliardoj da juanoj, el kiuj 75% estos kolektitaj de la Pekina Fervoja Bankbranĉo. En la komenco de la fervoja konstruado la banko renkontis proporcion perturbon inter deponitaĵo kaj kredito. La bankbranĉo kolektis alt-interezan kapitalon por la konstruado. Kaj tial ĝi perdis 7 milionojn da juanoj da interezo. Estro de la bankbranĉo s-ro Wang Pingchuan (Ŭang Pingĉuan) diris: “La Pekin-Jiulong-a Fervojo estas grava konstruo de la lando, ni devas tutforte subteni ĝian konstruadon.”

La unuan de julio 1993 maŝino metis trakon 25 m longan sur la taluson. La Pekin-Jiulong-a Fervojo, nova fervoja arterio, etendiĝos de sia startpunkto Pekino al la sudo. ■

FILMA MERKATO EN ĈINIO

ĈINIO kun 1.1 miliardoj da loĝantoj havas grandan filman merkaton — ĉiujare antaŭ 1988 la nombro de spektantoj de filmoj estis 20 miliardoj da hom-fojoj. Tamen dum longa tempo spektantoj por filmostudio ne estis sinonimo de filma merkato, ĉar en Ĉinio oni ĉiam praktikis la sistemon de planizita ekonomio, ke la studioj ne rekte vizaĝis al merkato. En 1993 Ĉinio posedis 16 rakontfilmajn studiojn. La de ili faritaj filmoj estis aĉetataj kaj poste distribuataj senescepte de la Ĉina Filma Eksport-Importa Korporacio (ĈFEIK), ununura enlande. Simple aspekta en la antaŭurbo, tiu korporacio monopoligis la filman merkaton plej grandan en la mondo.

Antaŭe ĈFEIK ne atentis profiton en sia komerco. Ĝi aĉetis ĉiujn landajn filmojn, ĉu bonajn ĉu malbonajn, kaj tuj pagis laŭ la difinita prezo. Kvankam iuj studioj plendis, ke ĈFEIK multe profitis de iliaj bonkvalitaj filmoj, tamen pro tio la studioj povis ne respondi pri siaj malbonkvalitaj filmoj. Fakte ĈFEIK prenis sur sin ĉiujn deficitajn kaŭzajn de la malbonkvalitaj filmoj. Tio ne nur malhelpis la studiojn fari bonajn filmojn, sed ankaŭ aldonis al la ŝtato grandan finanĉan ŝarĝon. En 1993 koncerna departemento publikigis projekton reformi la distribuadon de filmoj.

Laŭ la projekto, la ŝtato senrajtigis ĈFEIK je monopoligo de distribuado de landaj filmoj. Rezulte de tio, la studioj distribuos kaj vendos siajn filmojn rekte al distribuaj korporacioj de ĉiuj provincoj kaj municipoj.

La reformado por la sin trenantaj studioj estas terure malfacila, ĉar ne nur ĈFEIK ne plu funkcios kiel meza ĉenero dum distribuado, sed pli grave estas, ke la reformado nuligos la ŝtatan monopolan aĉetadon de filmoj de ĉiuj studioj. Kiun filmon kaj kiom da kopioj aĉetos la filmo-distribuaj korporacioj de provincoj aŭ municipoj, tio tute dependos de ilia komerca bezono. En la pasintaj jaroj filmo estis rigardata kiel pura kultura afero kaj monopole aĉetata kaj vendata de la ŝtato; studioj kaj filmistoj zorgis la artan valoron anstataŭ la merkatan profiton de filmo. Plie, en la lastaj jaroj nombro da alilandaj kaj Hongkong-aj filmoj toren-

tis en Ĉinion kaj ĉie troviĝis videobendaj kaj laser-videodiskaj projekciejoj. Ĉio ĉi kaŭzis, ke la enlanda merkato ne interesigas pri plejparto da ĉinaj filmoj, kvankam de post 1988, la filmo "Ruĝaj Sorgoj" gajnis la premion "Ora Urso" en la Internacia Film-festivalo en Berlino, poste serio da ĉinaj filmoj, ekz. "Akuzado de Qiuju" kaj "La Lasta Vido", estis premiitaj sinsekve en internaciaj film-festivaloj en Venecio kaj Cannes, unuaklasaj film-festivaloj en la mondo. En Ĉinio la tradicia Printempa Festo estas ora tempo por filmo same kiel Kristnasko en Okcidento. Tamen en la lasta Printempa Festo ĉiuj kinejoj malprofitis. Laŭ statistiko, nur 30% de la sidlokoj estis okupitaj de spektantoj de ĉinaj filmoj. La biletpago eĉ ne kovras la elek-

(Daŭrigo sur p. 33)

Kinoteatro en Pekino



Monkolekto por Fondaĵo EPĈ-abono

Pro altiĝo de la kostoj de eldonado kaj sendado de "El Popola Ĉinio" ni reguligas de la pasinta jaro la abonkotizon kiel jene: la jara abono (inkluzive de sendokostoj) por la evoluintaj landoj kaj evoluantaj landoj respektive estas 26,00 kaj 14,40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloraj valutoj ŝanĝeblaj en usonajn dolarojn. Pro tio la plejmulto de niaj legantoj en la orienteŭropaj landoj, la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj la evoluantaj landoj, kiuj havas grandan malfacilon en ekonomio, ne povas plu aboni nian revuon. La reduktiĝo de abonantoj pli altigis la produktokoston de nia revuo kaj devigis nin malpliigi ekde ĉi tiu numero la kolorajn bildojn. Ĉi tie ni petas de niaj legantoj komprenecon kaj pardonon.

Konsiderante ilian fortan

deziron daŭre legi nian revuon, ni decidis establi FONDAĴON EPĈ-ABONO, per kiu ni pagos la abonkotizon por iuj malnovaj legantoj kaj esperantistaj aktivuloj de la supre menciitaj landoj. Ni elprenos parton de la rentumo de Ghiselin-Fondaĵo de "El Popola Ĉinio" kiel bazan monsumon de FONDAĴO EPĈ-ABONO. (Tio tute konformas al la deziro de la belga samideano Charles Ghiselin, kiu testamentis, ke lia heredaĵo al EPĈ estu uzata por disvolvo de Esperanto.) Samtempe ni kore petas, ke esperantistoj de la landoj kun bonaj ekonomiaj kondiĉoj monofere al FONDAĴO EPĈ-ABONO por helpi la nepagipovajn samideanojn. Bonvenas eĉ malgranda sumo. Ni ĉiujare aperigos en nia revuo la nomon kaj ofersumon de ĉiuj donacintoj. Helpemuloj bonvolu sen-

di monon (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) al la konto A/C No. 71411749 je la nomo From People China (El Popola Ĉinio) ĉe Bank of China (Banko de Ĉinio). La adreso de la Banko de Ĉinio estas: Fuchengmennei Dajie, CN-100818 Beijing, Ĉinio. Sendante monon, bonvolu sciigi al ni pri la celo de la oferita mono kun kopio de la banka ĉeko. Oni povas sendi ankaŭ monbiletojn (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) rekte al ni en registrita koverto. La adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.

Antaŭdankon pro via konsidero kaj monofero al FONDAĴO EPĈ-ABONO!

La Red.

Reago al Fondaĵo EPĈ-abono

Ĉi-sube ni listigas la donacojn al Fondaĵo EPĈ-abono ricevitaĵajn ĝis la 15-a de januaro 1994.

Ĉinio: Cai Shouzhi (10,00 juanoj); Chen Jiansheng (14,80 juanoj); Liu Jinzhang (10,00 juanoj); Su Dabao (25,00 juanoj); Yang Yuguang (100,00 juanoj); Ye Fangbi (15,00 juanoj); Zheng Fenbiao (500,00 juanoj). **Francio:** Pierre Orliange (150,00 francaj frankoj). **Italio:** Giuseppe Trambaiolo (32000,00 italaj liroj); Domenico Trombetta (800,00 nederlandaj guldenoj). **Tajlando:** Francisko Andreoni (40,00 usonaj dolaroj). **Venezuelo:** J.E. Bachrich (15,00 usonaj dolaroj).

Multajn dankojn al la supraj donacintoj!

La Red.

SANPROTEKTA TEORIO DE TAOISMO

de HOU JUELIANG

KROM budhismo, kristanismo kaj islamismo, enkondukitaj el aliaj landoj, Ĉinio havas ankaŭ sian propran religion taoismo.

Taoismo naskiĝis en la 2-a jc p.K. Taoistoj rigardas Laozi kiel sian Sinjoron kaj lian libron “*Daodejing*” kiel sian sutron. Taoistoj disvolvas humanismon kaj celas al savo de mizeruloj kaj suferantoj. Ili energie faras ĉigong-ekzercadon kaj prenas eliksirojn kun la revo esti ĉiam junaj. Ili revas pri feiĝo. Pro tio taoismo estas nomata ankaŭ feismo kaj ĝia teorio — fea doktrino.

Kiam naskiĝis taoismo, budhismo jam enkondukiĝis en Ĉinion. Dum longa tempo la du religioj estis alte taksataj de la feŭdaj regantoj de Ĉinio. Budhismaj kaj taoismaj temploj troviĝis preskaŭ ĉie en nia lando. Ili havis profundan influon sur la ĉina nacio. Ankaŭ iuj ĉinaj imperiestroj budhistiĝis kaj kredis je taoismo aŭ budhismo. Taoismo, budhismo kaj konfuceanismo vaste influis la historion, filozofion, literaturon kaj socian

vivon de Ĉinio. Ili estas grava konsistiga parto de la ĉina kulturo.

Taoismo diferencas de aliaj religioj per tio, ke ĝi alte taksas ne la postmortan transmigradon de la animo, sed la nunan vivon. Laŭ ĝia doktrino, oni devas vivi feliĉe kaj libere, kiam li estas viva. Taoistoj aspiras al fea mondo. Ili ne neas la kurantajn homajn interesojn kaj estas por la raciaj homaj deziroj kaj kontraŭ asketismo. Laŭ taoismo ĉiuj rajtas aspiri al la spirita libereco kaj dank’ al longatempa ĉigong-ekzercado fariĝos ĉiam junaj.

Antaŭ kvin jaroj mi vizitis Wudang-monton de Hubei, la taoisman sanktejon de Ĉinio. La loko estas kvietaj kun bela pejzaĝo. Tie mi vidis grandaĝajn taoistojn. Ili ĉiuj estis fortaj kaj viglaj. Pro scivolemo mi demandis maljunan taoiston: “Sinjoro, kiom da jaroj vi aĝas?” Anstataŭ respondi li nur ridetis kaj demandis min: “Ĉu vi faras ĉigong-ekzercadon?” “Kial li ne respondis mian demandon?” Kun miro mi demandis min. Iu apudstaranto diris: “Li aĝas pli

ol 100 jarojn, tamen ne decas demandi lin pri tio.” Ho, mi rememoris la taoisman regulon, ke taoistoj neniam preparolas sian aĝon. Ili kredas pri sia longa vivo kaj por ili estas nenecese memori sian aĝon. Ili emas diri: “La vivon decidis mi mem, sed ne la ĉielo.”

Laŭ la vidpunktoj de la moderna medicino la taoisma doktrino ja estas absurda, ĉar neniu povas esti ĉiam juna kaj neniu vidas senmortan taoiston. Tamen, la enhavo de taoismo ne estas plene feĉa. Ĝia sanprotekta teorio estas utila kaj konformas al la teorio de la moderna medicino. Se oni bonordigas sian vivkutimon kaj ekzercas la korpon laŭ la sanprotekta teorio de taoismo, tio do povas plilongigi lian vivon.

Taoismo alte taksas la sociajn moralojn. Ĝi postulas, ke ĉiu konduku laŭ la moralaj principoj en la saniga ekzercado. Por feiĝo laŭ la teorio de taoismo oni antaŭ ĉio devas esti honesta kaj bonfarema, ne fari malbonon, vivi mallukse, kaŝi alies malĝustaĵojn, diskonigi alies virton, fari oportunon al aliaj, vivi harmonie kun la najbaroj kaj neniam ofendi ilin, kaj plie, oni devas esti honesta kaj malavara, kompati orfojn kaj vidvinojn kaj helpi mizerulojn, alie oni vane faros memkulturadon. Ĉi tie taoistoj konkrete eksplikis la konfuceanisman tezon, ke vivlongeco devenas de humaneco. Tio estas aprobinda.


La sanstato estas nedisigebla de animstato. Por esti ĉiam sana, laŭ taoismo, oni devas reguligi kaj bridi sian psikologian aktivadon, ĉar ĉia ajn malbonhumoro, senĉesa cerbumado kaj troa avido multe konsumas energion kaj kaŭzas fiziologian perturbon, malsanon kaj eĉ morton. Taoismo proponas, ke oni devas mal multe pensi, aspiri, paroli, ridi, ĉagreniĝi, ĝoji, koleri, ami kaj

malami. Unuvorte, oni devas bridi ĉiujn siajn aspirojn kaj ĉiam teni sian animstaton en modereco.

Kun animstato normala oni povas esti kvietaj en si. Taoismo tre akcentas kvietecon kaj malaprobas malpaciencon. "Kvieto kondukas al longa vivo, dum malpacienco al frua morto." Taoismo pledas por loĝi en kvietaj ĉambroj, vivi en la medio kiel eble plej kvietaj kaj sen ekstera ĝeno. En la kvietaj medioj oni devas forgesi la ekziston de la ekstera mondo, por ke la tuta spirita aktivado koncentriĝu sur la memo kaj la spirito kaj korpo kunfandiĝu en harmonian tuton. Surbaze de tio,

oni devas fari pluan memkulturadon, t.e. teni sin en absoluta kvieteco kaj forigi ĉian ajn aspiron, neniam deziri tion, kio ne apartenas al li, ne esti ĝenata de la ekstera mondo. Nur tiokaze oni povas sidi, forgesante ĉion, t.e., kviete sidi, ĉesigi la sensadon de la okuloj kaj oreloj, alivorte, forgesi ne nur la eksteran mondon, sed ankaŭ sian memon, sian animon kaj sian korpon. Tiam oni ne sentas sin mem, nek la ekziston de la universo, tiel ke li proksimiĝas al la komplete malplena stato, simila al fea mondo. Ĉiuj taoistoj devas fari longatempe kvietan sidadon kaj ĉigong-ekzercadon.

Ankaŭ en la ĉiutaga vivo taoistoj observas rigorajn regulojn. Ili bezonas kvieton kaj movadon. Ili asertas, ke la vivo



estas nedisigebla de movado. Ili opinias, ke oni devas ofte fari ion, por ke la korpo estu en la konstanta movado. Sen movado akvo mucidas, sen movado la homo putriĝas. Tamen oni ne devas esti tro laca, oni ne devas tro iri kaj sidi, nek tro longe aŭskulti kaj rigardi. Oni devas ripozi, tuj kiam li laciĝas. Koncerne la dormadon, oni devas elekti taŭgan direkton kaj ne devas kuŝi kun la kapo norden, ĉar tio malutilas al la psikostato. Printempe kaj somere oni devas kuŝi kun la kapo orienten kaj aŭtune kaj vintre kun la kapo okcidenten. Oni devas dormi ĉiam kun la genuoj fleksitaj. Por eviti malvarmumiĝon en ŝvitego oni ne devas sin malvesti.

Oni devas manĝi ne tro sate, trinki ne tro multe kaj ĉiam

preni manĝaĵon en regula tempo. Oni ne devas esti frandema. Oni devas preni nutraĵon el vegetaloj. Kuiritaj manĝaĵoj estas preferindaj ol la krudaj. La tro varmaj manĝaĵoj malutilas al la ostoj, dum la tro malvarmaj damaĝas la stomakon. Preninte varmajn manĝaĵojn, oni devas preni la malvarmajn aŭ trinki iom da malvarma akvo. Oni ne devas multe drinki, ĉar ebriiĝo malutilas al la nervoj kaj kaŭzas malsanon. Ebriulo ne devas kuŝi en vento nek ventumi sin, alie li malsaniĝos.

La sanprotekta teorio de taoismo tuŝas ankaŭ seksumadon. Taoismo opinias, ke modera seksumado utilas al la sano. Oni ne devas nuligi la pasion, nek esti voluptama. ■

ESP-NOVAĴOJ

Ni bonvenigas Esperantajn artikolojn, Esp-novaĵojn kaj fotojn de ĉiuj aĵoj Esperanta organizo aŭ individuo. Bonvolu sendi kontribuojn al s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Pekino, 100037, Ĉinio.

La Red.

● Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Mao Zedong (la 26-a de decembro 1993), kunfondinto de la Ĉina Popola Respubliko kaj simpatianto de Esperanto, pli ol 30 pekinaj esperantistoj kunsidis la 25-an de decembro 1993, dume ili festis la 54-jariĝon de lia skribaĵo por esperantistoj de Yan'an.



La kunsido okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Mao Zedong

● La 26-an de decembre 1993 la Handan-a E-Asocio de Hebeiprovinco okazigis jarkunvenon de 1993, en kiu oni resumis la laboron de 1993, ellaboris laborplanon de 1994 kaj prepariĝis por fondi la Junularan E-Asocion de Handan.

Gaja festo en Barcelono por la 78-a UK



● Lastatempe la gazeto "Ĉina Filatelo" publikigis la artikolon "Esperanto kaj Filatelo" verkitan de veterana esperantisto Zhang Linrui (Ĝang Linĵuj) kaj aperintan en la revuo "La Mondo". La gazeto havas 17 milionojn da legantoj, kaj pro tio multaj filatelistoj ekkonis Esperanton kaj ĝian rolon en la poŝta kampo.

● De la 10-a ĝis la 17-a de julio 1994 okazos en Pekino la 4-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto. En la konferenco oni ne nur traktos problemojn scienc-teknikajn, medicinajn, komercajn, ĉigong-terapiajn kaj Esperanto-instruajn, sed ankaŭ diskutos pri novaj fizikaj konceptoj kaj studos la teorion de tri-energia kampo de la kosmo.

Nun esperantistoj el Francio, Germanio, Aŭstralio, Usono kaj aliaj 6 landoj petis partopreni la konferencon.

● De la 23-a ĝis la 25-a de septembro 1993 la Stomatologia Sekcio de UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio) okazigis en Brazilio internacian kurson pri la plej moderna fako de stomatologio, t.e. ostointegreblaj dentaj enplantoj. La kurson partoprenis gestudentoj de universitatoj kaj profesuloj el Brazilio, Goiânjo kaj Anapoliso.

● Zamenhof skribis: "Lingvo internacia havas la celon krei inter la gentoj neŭtralan ponton en rilato lingva, la homaranismo volas krei tian saman ponton en ĉiuj rilatoj. La homaranismo estas nur plifortigita esperantismo, kaj ĉiuj tion ĉi sentas, kvankam ne ĉiuj volas tion ĉi laŭte diri." Informo-Servo celas ebligi kontakton inter ĉiuj, kiuj interesiĝas pri homaranismo. Tial ili preparas la Tutmondan Homaranistan Adresaron. Se

vi deziras registriĝi vian adreson en tiu ĉi adresaro, bv. sciigi al: Informo-Servo, Bismarckstr. 28, D-35037 Marburg, Germanio.

● La 12-an de oktobro 1993 esperantistoj en Tuluzo de Francio respondis al la alvoko de Esperanto-Kultur-Centro, kiu aranĝis la Ago-Tagon por Esperanto helpe de la diversaj Esperanto-asocioj de Tuluzo kaj la regiono. Pli ol 20 esperantistoj plenigis enketilon pri Esperanto kaj la lingva problemo al preterpasantoj sur la placo kaj stratetoj. Ili regroupiĝis antaŭ la urbodomo kun flagrubandoj kun surskribo "Esperanto" kaj "Pour défendre nos langues: l'espéranto" (por defendi nian lingvon: Esperanto).



En la Ago-Tago por Esperanto

● En 1993 la Stipendio Ivo Lapenna estis aljuĝita por faklaboraĵo: "Naturaj kaj artefaritaj lingvoj: Sintakso de la angla lingvo kaj de Esperanto", disertacio akceptita de la Universitato de Pavia de Italio, la aŭtoro estas d-ino Paola Pruzzi. Aŭtoroj dezirantaj kandidatiĝi al la Stipendio bv. peti la detalan regularon laŭ la adreso: S-ro Torben Svendsen, Vanløse Allé 57, DK-2720 VANLØSE, Danlando.

● Dum la pasinta somera ferio gejunuloj el Pollando, Ruslando, Belgio, Ĉeĥio kaj Bulgario partoprenis en la Internacia Skolta E-ista Tendaro "Skolto '93" en la ĉeĥa urbo Opava. Dum dek tagoj oni studis Esperanton en rapida kurso, promenadis en proksimaj arbaraj montoj, naĝis en la pura rivero Moravica kaj multe ludis.

MATENE de la 3-a de novembro 1993, en iu apudmara urbo de suda Ĉinio, grizhara viro veturigis grandan martestudon per triciklo. La pasantoj haltis kaj mire rigardis la beston.

Je la deka matene, ĉe la maro kolektiĝis sennombraj rigardantoj. Ili estis atendantaj la emocian momenton — lasi la martestudon en la maron. Post krakado de petardoj la familianoj de la viro atente levis la martestudon kaj malrapide metis ĝin en la maron. La testudo ekmovis la piedojn kaj subakviĝis. Sed poste ĝi plurfoje elakviĝis ŝajne por esprimi dankon al la viro pro lia liberigo.

“Kia testudo!” miris la rigardantoj. Ili ĉirkaŭis la viron kaj demandis lin pri ĝiaj pezo, aĝo k.a.

Unu tagon antaŭe, iu fiŝisto

POR KOMENCANTOJ

Hejmenreveno de martestudo



kaptis en maro la grandan nigran martestudon. Ĝi longas 1.3 metrojn, larĝas 1 metron kaj pezas 200 kilogramojn. Iuj taksis, ke la testudo aĝas pli ol 800 jarojn. La viro vidis ĝin en bazaro kaj tuj aĉetis ĝin, ĉar li scias, ke martestudo estas besto protektata de la ŝtata leĝo kaj oni ne devas kapti kaj buĉi ĝin.

Por diskonigi la ŝtatan leĝon pri protektado de raraj bestoj, la viro petis skribi multajn anoncojn pri liberigo de la testudo en la sekvanta tago kaj gluis ilia en publikaj lokoj. Por ke la testudo evitu refojan kapton, li petis fari arĝentan lameton kun lia nomo kaj la vortoj “Memore al liberigo” kaj ligis la lameton al la testuda ŝelo per arĝenta ĉeno. En la sekvanta tago multaj homoj venis al la maro post leĝo de la anonco kaj unuvoĉe laŭdis la bonfaron de la viro. ■

SENTENCOJ DE FILOZOFOJ

TEORIO DE SANPROTEKTO

Taoisto Ge Hong (283-343) estis erudicia filozofo kaj sciencisto. Li kontribuis per multaj verkoj. Liaj traktatoj pri senmortulo, diablo, ekzorco, senplagigo, recepto, sanprotekto kaj vivlongigo metis teorianton bazon de taoismo.

Ofte laboru, sed ne tro laciĝu.

Ne tro longe sidi, iri, rigardi kaj aŭskulti. Ne manĝi sen malsato, nek trinki akvon sen soifo.

Abstini de manĝaĵo tro grasa, acida kaj sala.

Tiu, kiu bone scias protekti la sanon, ne

multe manĝas nek multe trinkas, ne troe varmigas sin vintre kaj ne troe malvarmigas sin somere.

Tiu, kiu deziras protekti la sanon, devas liberigi sin de avido al famo, mono kaj amorĝuo, gardi sin kontraŭ frandemo, flatemado, deprimiteco kaj ĵaluzo.

Ĉu akuzativo aŭ nominativo post la subjunkcio “kiel”?

de WANG CHONGFANG

KIEL oni scias, la uzo de akuzativo post **kiel** povas forigi duban sencon. Jen du ekzemploj:

Mi elektis lin kiel prezidanto. (Z) (Mi estis prezidanto kaj mi faris la elekton.)

Mi elektis lin kiel prezidanton. (Z) (**Kiel** montras la rezulton de la elekto.)

En la dua ekzemplo la akuzativo post **kiel** faris la frazon tre klara, sekve ĝi estas absolute necesa, kaj sen ĝi certe estiĝus senkonfuzo. Kaj tamen, aliflanke, se oni misuzas akuzativon post **kiel**, tio certe kaŭzas duban sencon aŭ miskomprenon. En la fame konata “Vortaro Japano-Esperanta” (dua eldono), kompilita de Miyamoto Masao, mi trovis jenajn frazojn:

1) *Ankoraŭ neniam mi vidis tian homon, kiel lin.* (p. 54)

2) *Tio neniel concernas tian ulon, kiel vin.* (p. 132)

3) *Mi malrespektas elkore tian, kiel lin.* (p. 267)

Estas klare videble, ke la kompilinto de la vortaro sisteme uzas akuzativon post **kiel** en la frazkonstruo “tian -on, kiel -n”. Ĉu tia uzo de akuzativo estas aprobinda? Por respondi tiun ĉi demandon, oni devas fari gramatikan analizon al la frazkonstruo.


El ĉiuj Esperantaj vortoj eble **kiel** havas la plej multajn gramatikajn funkciojn. Ĝi povas esti uzata ĉefe kiel 1) demanda adverbo (*Kiel vi fartas?*), 2) ekkria adverbo (*Kiel bela ŝi estas!*), 3) adverbo enkondukanta dependan demandon (*Rakontu al mi, kiel tio okazis*) aŭ ekkrian subjunkcion (*Neniam mi forĝos, kiel bonaj estas vi kaj via edzo*),

4) adverbo enkondukantan infinitivon por determini substantivon (*Ŝi bone scias la arton, kiel plaĉi al la viroj*) aŭ por servi kiel objekto de verbo (*La princo meditas, kiel lin puni*), 5) partikulo servanta kiel liganta vorto (*Ili akceptis min kiel gaston*), 6) subjunkcio enkondukanta subjektan subjunkcion (*Sed mirigas min, kiel vi, pastro, havas bonvolon por mi en via koro*), 7) subjunkcio enkondukanta samgradigan komparon por klarigi, ilustrati aŭ kvalifiki agon (*barakti kiel fiŝo ekster la akvo*), eon (*Li estas pala kiel kadavro*) aŭ estaĵon (*Hejma dometo estas kiel patrineto*), ktp.

Kiam **kiel** estas uzata por enkonduki samgradigan komparon, la kompara subjunkcio povas havi verbon malsaman ol la ĉefsubjunkcio (ekzemple: *Kiel la glacio per la suna varmo degelas, tiel lia spit' rigida al la insista panja peto cedis*) aŭ saman verbon kiel la ĉefsubjunkcio. En la lasta okazo la subjunkcio estas

preskaŭ ĉiam elipsa, t.e., oni ne bezonas ripeti la verbon en la subjunkcio, ekzemple: *Li tremas kiel aŭtuna folio (tremas); Petro naĝas kiel fiŝo (naĝas); Li amas ŝin kiel frato fratino (amas); Li prizorgas vin kiel patro sian filon (prizorgas)*. Kaj se subjunkcio havas saman subjektan kaj saman verbon kiel la ĉefsubjunkcio, oni subkomprenas en la subjunkcio ne nur la verbon, sed ankaŭ la subjektan, ekzemple: *Li amas ŝin kiel (li amas) sian fratino*. En la okazo, kiam la subjekto de la subjunkcio estas **oni**, tiam mankas en la subjunkcio ankaŭ la subjekto, ekzemple: *Li amas la infanon kiel (oni amas) filon*. Do el la supre donitaj ekzemploj ni povas konkludi, ke la esprimitaj subjunkciaj frazelementoj devas havi la saman kazon, kiel la ĉefsubjunkciaj frazelementoj, al kiuj ili rilatas, ekzemple: *Ili traktis lin kiel amikoj (amikoj estas la subjekto de la subjunkcio, do nominativa); ili trak-*

La aŭtoro



tis lin kiel amikon (**amikon** estas la objekto de la subpropozicio, do akuzativa).

Sed ĉe la komparoj de la kvalito la afero estas alia. Tiaokaze la esprimitaj frazelementoj post **kiel** staras ĉiam en nominativo, eĉ se ili rilatas al alikazaj ĉefpropoziciaj frazelementoj, ĉar ili estas ĉiam subpropoziciaj subjektoj, ekzemple:

Li estas tiel forta, kiel (forta estas) mi.

Li pentris min bela kiel (bela estas) anĝelo.

Mi vidis tie melonon grandan kiel (granda estas) barelo.

Mi faros vian idaron kiel (grand-nombra estas) polvo de la tero.

Ŝi havas okulojn bluajn kiel (blua estas) cejano.

Jen estas kelkaj ekzemploj de Zamenhof kaj Kabe:

Ŝi donis al sia florejo formon rondan, kiel la suno. (Z)

Ĉu iu alia ol mi mem povus amii tian sovaĝan beston, kiel mia edzo? (Z)

La hundo havas du okulojn tiel grandajn, kiel du tasoĵ. (Z)

La princo tre amis la fidelan, kiel hundo, Patroklon. (Kabe)

Koncerne la komparojn de aĵoj, se la komparitaĵo estas anoncata en la ĉefpropozicio per **tia** kaj **tia sama** kaj la subpropozicio estas elipsa, laŭ la Zamenhofa kutimo la subpropozicio estas enkondukata ĉiam per **kiel** kaj la esprimita frazelemento post **kiel** staras ĉiam en nominativo. Ekzemple:

Mi ne estas tia kantistino, kiel tiu. (Z)

Tion mi devas al vi diri, ke tia malgranda knabino, kiel vi, neniam ricevas permeson por eniri. (Z)

Ĉi tiu demando estis farita per tono ĝentila, sed samtempe tiel seka kaj malvarma, ke ĝi havis la saman signifon, kiel klara rifuzo. (Z)

Iafoje la subpropozicio povas esti senelipsa, tiam ĝi estas enkondukata per **kia**:

Restu ĉiam tia, kia vi estas. (Z)

Li estis tia, kiaj estas ĉiuj junaj kaj ofte eĉ maljunaj viroj. (Z)

Ĝi estas tia sama komercejo, kiaj

estas ĉiuj aliaj komercejoj. (Z)

La supraj ekzemploj diras al ni, ke Zamenhof konsekvence uzas **kiel** por enkonduki elipsan subpropozicion, t.e. la solan frazelementon, kiu staras post **kiel**, ĉar tiu ĉi frazelemento, kiel montras la senelipsa subpropozicio enkondukata per **kia**, estas la subjekto de la subpropozicio. Sed ofte okazas, ke pro la influo de la akuzativo, al kiu **kiel** rilatas, oni inkludas misuzi akuzativon ĉe la frazelemento post **kiel**. Tiam eraron ne povis eviti eĉ Kabe, tre bona stilisto de nia lingvo. En lia majstra traduko "La Faraono" oni povas legi jenan frazon:

Ne eble estas, ke homo, kiu, kiel vi, vidas sanktajn skarabojn en la sablo en interspaco de kelkdeko da paŝoj, ne rimarkis tiel grandan personon, kiel la kronprincon. (vol. I, p. 50)

Estas menciinde, ke la uzado de **kiel** kaj **kia** fare de Kabe ne estas konsekvenca. Ekzemple, en "La Faraono" li kutimis uzi **kiel**, dum en "Patroj kaj Filoj" li ĉiam inkludis uzi **kia**:

La saĝo de tiaj profetoj, kiel vi, pli utilos la ŝtaton, ol la soldatoj. ("La Faraono", II, p. 23)

Kiam virino povas elekti inter la kronprinco kaj tia kantisto kiel mi, mi ne bezonas timi. ("La Faraono", II, p. 128)

Pentuer ja ne devenas de la pastroj, sed de tiaj mizeruloj, kiel mi. ("La Faraono", III, p. 45)

Ŝi tuj de la unua fojo invitis al si tiajn aristokratojn, kiaj vi kaj mi. ("Patroj kaj Filoj", p. 83)

Vi ja estas tia sama, kia mi. ("Patroj kaj Filoj", p. 99)

Mi amas tiajn dometojn, kia via, malnovajn kaj varmajn. ("Patroj kaj Filoj", p. 130)

Tiajn homojn kiaj ili, en via granda mondo vi ne trovos. ("Patroj kaj Filoj", p. 204)

Do el la supraj analizoj ni povas tiri la konkludon, ke la akuzativo post **kiel** en la tri frazoj, kiujn ni citis en la komenco de tiu ĉi artikolo, estas misuzita kaj sekve devus esti ŝanĝita en nominativon. ■

ABONTARIFO DE EPC POR 1994

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendkosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	19,00	16,00	35,00
Aŭstrio	ATS	192,00	128,00	320,00
Belgio	BEF	575,00	375,00	950,00
Britio	GBP	10,00	6,00	16,00
Germanio	DEM	28,00	18,00	46,00
Finnlando	FIM	61,00	50,00	111,00
Francio	FRF	88,00	62,00	150,00
Israelo	USD	14,00	12,00	26,00
Italio	ITL	20200,00	13800,00	34000,00
Japanio	JPY			4200,00
Kanado	CAD	17,00	15,00	32,00
Nederlando	NLG	28,00	23,00	51,00
Nov-Zelando	NZD	26,00	22,00	48,00
Svisio	CHF	23,00	17,00	40,00
Usono	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO A	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO B	USD			15,00
TARIFO C	USD			10,00
TARIFO A: Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.				
TARIFO B: Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.				
TARIFO C: Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Latvio, Litovio, Estonio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.				



La kunsido de junaj ĉinaj esperantistoj

YU TAO:

Nova paŝo de junaj ĉinaj esperantistoj

LA Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (ĈJEA), fondita en marto 1993, iras kiel infaneto, paŝo-post-paŝe antaŭen subtenate de maljunaj esperantistoj. Post sia fondiĝo, ĈJEA aktive kontaktiĝis kun Esperantaj organizoj kaj esperantistoj en kaj ekster la lando. Dum la 49-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, kiu okazis en Vraca de Bulgario, ĈJEA estis akceptita kiel nova landa asocio de TEJO. De la 2-a ĝis la 4-a de decembro 1993, ĈJEA invitis junajn e-istojn de Pekino, Tianjin kaj Chengde, Tangshan kaj Handan de Hebei-provinco al kunsido en Pekino.

Estis la unua fojo por ĈJEA okazigi tian kunsidon, tamen helpe de spertuloj ĝi sukcese organizis la kunsidon kaj prenis tion kiel bonan ŝancon por sin ekzerci. En la inaŭguro, s-ino Tan Xiuzhu, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), kaj s-ro Zou Guoxiang, ĝenerala sekretario de ĈEL, emfazis, ke la junularo estas espero de la Esperantomovado. ĈJEA, kiel junulara sek-

cio de ĈEL, devas preni sur sin pezan taskon por antaŭenpuŝi la ĉinan Esperanto-movadon.

S-ro Yu Tao, prezidanto de ĈJEA, kaj reprezentantoj el diversaj lokoj raportis pri siaj laboroj en la pasinteco kaj prezentis la perspektivon de la ĉina junulara Esperanto-movado. Ili opinias, ke ĉar aperis junaj aktivuloj en ĈEL kaj en diverslokaj Esperanto-organizoj, la ĉina junulara Esperanto-movado eniris en novan etapon.

La reprezentantoj diskutis en grupoj pri la raportoj kaj ĝuis amuzan vesperon.

F-ino Sabira Stahlberg, eksa vicprezidanto de TEJO, estis invitita al la kunsido, kaj kune kun f-ino Yin Qin, estrarano de ĈJEA, zorgeme preparis la programojn por la agrabla vespero. F-ino Sabira ludis la rolon "Zamenhof" en la programo "Zamenhof diras...". "Zamenhof" ordonis la partoprenantojn fari diversajn ridigajn movojn kaj ili ekzercis sin per Esperanta konversacio en la ludoj "Kiu besto mi estas" kaj "Gustumi trinkaĵojn". La interesa programo "Sidiĝi sur seĝon kiel

eble plej rapide" kun ĉina trajto estas ekzotika por f-ino Sabira.

En gaja etoso ili amikiĝis unu kun alia, kvankam ili venis el diversaj lokoj. Dum la diskutado ili diris siajn opiniojn kaj prezentis multajn bonajn proponojn rilate al la junulara movado.

La kunsido kun riĉa programaro iris ĉiam en vigla etoso. Kvankam la tempo estis mallonga, tamen la reprezentantoj atingis komunan opinion en jenaj punktoj: plimultigi membrojn de ĈJEA; oftigi interŝanĝon kaj kunlaboron enlande kaj internacie; starigi kontakto-reton de tutlandaj junaj aktivuloj; rapide altigi la lingvan nivelon; daŭre okazigi similajn kunsidojn, tendumadon kaj renkontiĝojn. Ili interkonsentis, ke reveninte al sia hejmloko ili certe klopodos akceli la junularan Esperantomovadon de sia loko.

En la historio de la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio, tiu ĉi kunsido okupas gravan paĝon, ĉar la junaj ĉinaj esperantistoj faris novan paŝon al la espero-plena estonteco. ■

Uŝuo — trezoro de la ĉina kulturo

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de LIU SIGONG

LEGINTE artikolojn pri la ĉina uŝuo en nia revuo, iuj legantoj deziras pli multe scii ĝin. Ĉi sube ni koncize konigos ĝin, eble tio estos utila al vi.

Kio estas uŝuo? Simple dirite, ĝi estas unu el la ĉefaj branĉoj de la ĉina nacia sporto kaj unu el la metodoj de ĉinoj ekzerci la korpon kaj defendi sin dum miloj da jaroj. Uŝuo konsistas el serioj da luktmovoj, duopa lukto kaj aliaj. Luktmovojn konsistigas solludo de bokso, glavo, lanco, spado kaj bastono kaj duopa lukto. La duopa lukto konsistas el batado, puŝado kaj lukto per longaj kaj mallongaj armiloj. Ĉangĉjūan-bokso, tajĝiĉjūan-ekzerco, nanĉjūan-bokso kaj ludo de spado, glavo, lanco kaj bastono estas listigitaj kiel branĉoj de konkurso. Uŝuo estas efika por fortigi la korpon kaj hardi la volon.

Uŝuo, unu el la kulturaj heredaĵoj de la ĉina nacio, estas enhavoriĉa. La libro "Plena Kolekto de Ĉina Uŝuo" kun 800 000 ideogramoj konigas cent ludmanierojn de bokso, 70 tradiciajn armilojn, 160 praktikajn artojn kaj ĉ. mil teknikojn. La verkisto diris kun emocio: "La enhavo de uŝuo estas tiel riĉa, ke malfacilas konigi ĝian ĉion en unu plena kolekto."

La plej evidenta trajto de la ĉina uŝuo estas, ke ĝi burĝonis, disvolviĝis kaj perfektigis kadre de la ĉina kulturo, sorbis sukcon de la tradiciaj kulturoj kaj formis grandan kulturan sistemon tiuri-

late. Kun la ĉina kulturo kiel sia teoria bazo uŝuo estas multe influata de ĝi en diversaj flankoj. Uŝuo havas komunajn trajtojn de la internaciaj elstaraj sportbranĉoj kaj plene prezentas ankaŭ la trajtojn proprajn al la orienta sporta civilizacio.

La valoro de uŝuo kuŝas antaŭ ĉio en plena enkorpiĝo de la spirito de la ĉina nacio pri senĉesa strebado kaj ĉasado de bonaj virttoj. Uŝuistoj devas sperti rigorajn provojn en volo, kvalito ktp. Sen la spirito pri senĉesa strebado oni neniel sukcesas en uŝua trejnado. Uŝuo forte akcentas virtan edukadon kaj altan takson de virttoj dum sia popularigo. La uŝua edukado celas kulturi uŝuistojn kun bonaj virttoj.

En la urbo Cangzhou (Cangĝou) de Hebei-provinco oni komencis sin ekzerci per uŝuo jam antaŭ 1 400 jaroj. 50 specoj de


uŝuo originis kaj cirkulas en la loko. La uŝu-movoj de Cangzhou estas grandaj, rapidaj, fortaj kaj fareblaj. En la lastaj jaroj la amasa uŝu-aktivado populariĝis, proksimume 300 000 homoj en la urbo sin ekzercis per uŝuo. Laŭ la principo "alta takso de virttoj dum popularigo" oni listigis uŝuon kiel parton de la fizikkultura leciono en lernejoj. En nemalmultaj infangardenoj oni popularigas uŝu-gimnastikon.

La praktikado de uŝuo en miloj da jaroj kaj la esplorado pri uŝu-aktivado en la lastaj jaroj pruvis, ke ofta ekzercado per uŝuo havas bonan efikon por fortikigi la homan korpon.

La kerna tekniko de uŝuo estas tiu de atako kaj defendo. En ekzercado oni povas ne nur fortikigi sian korpon, sed ankaŭ lerni sciencan teknikon por atako kaj defendo. Uŝuo enhavas riĉajn


Maljuna uŝu-isto kaj junaj disĉiploj





Junaj uŝu-istoj

Li antaŭenpuŝas la aŭton per lanco kun la pinto premita sur la gorĝo.



teknikojn kaj profundajn teoriojn. La ekzercantoj ĉiuj sentas, ke se oni ekinteresiĝas pri uŝuo, oni do diligente ekzercos sin por plene posedi ĝin. Tial la uŝuistoj havas fortan deziron diskuti la arton. Ili amikiĝas unu kun alia en la diskutado. Jen kuŝas en tio la valoro de uŝuo en kontakto.

En Zhengzhou (Ĝengĝoŭ) de Henan-provinco, hejmloko de la skolo Ŝaŭlin de la ĉina uŝuo, jam trifoje okazis la Internacia Uŝu-

festivalo kun plena sukceso. En la Internacia Uŝu-festivalo de 1993 partoprenis 397 elstaraj uŝuistoj el 21 landoj kaj regionoj kaj la nombro de rigardantoj atingis 300 000.

La valoro de uŝuo kuŝas ankaŭ en tio, ke oni povas sin distri per beleco de uŝuo. En la antikveco, ĉu monarkoj, ĉu popoloj, ĉiuj kun plezuro serĉis estetikan belecon en uŝu-aktivado.


Uŝuo originis en Ĉinio kaj

apartenas al la tuta mondo. La ĉarmo de uŝuo estas konata de pli kaj pli multaj popoloj, kaj pli multaj sin ekzercas per uŝuo. En la 11-a Azia Sportkunveno uŝuo estis listigita kiel oficiala sporto-branĉo. Jam fondiĝis la Internacia Uŝuista Federacio kaj okazis la Unua Monda Ĉampioneca Konkurso de Uŝuo. Ni esperas, ke uŝuo estos ludata en la Olimpikoj kiel eble plej frue. ■



Ekzercado en Shaolin-templo

Kolektiva uŝu-ekzercado



DE YANGZHOU AL ZHENJIANG

Teksto de **JI PING**

Fotoj de **MO BINGCHUN**

HISTORIE la urbo Yangzhou altiris al si multajn verkistojn kaj poetojn, kiuj verkis multe da belegaj poemoj pri Yangzhou. Li Bai (701-762), granda poeto de Tang-dinastio (618-907), prikantis la urbon per la versoj "Mia amik' forlasis Pavilonon Flava Gruo, por Yangzhou en monato tria, pompa florsezon'." De tiam la versoj vekis elvokivecon pri la urbo kaj allogis turistojn al ĝi en la tria monato, kiam disfloras floroj.

LA ANTIKVA URBO YANGZHOU

Yangzhou allogis multajn literaturistojn per sia prospero.

Yangzhou situas ĉe Yangzi-rivero kaj ĝin trafluas la Granda Kanalo inter Pekino kaj Hangzhou. Dank' al tio, la urbo fariĝis kultura centro kaj komerca haveno inter sudo kaj nordo de Ĉinio. La tiama Yangzhou estis staplejo de salo, fero, drogherbo kaj teo kaj en ĝi kolektiĝis riĉaj komercistoj. Ili fiksloĝis en la urbo kaj aperis tie elegantaj privataj loĝejoj kaj ĝardenoj. Tial Yangzhou estis konata kiel poezia urbo norde de Yangzi-rivero.


Tamen la antikva urbo kun multe da hoteloj kaj tetrinkejoj estis tipa neproduktiva urbo. En la 15 jaroj post la ekpraktiko de reformado kaj pordomalfermo, la

tia ekonomio rapide disvolviĝis. En 1992 la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo de la urbo atingis 57.8 miliardojn da juanoj kaj okupis la 34-an lokon el la 50 ekonomie fortaj urboj de la lando. Urbestro Shi Guoxing (Ŝi Gūoŝing) diris, ke en 1989 en Yangzhou estis nur tri entreprenoj, kies jara produktovaloro superis 100 milionojn da juanoj. Ili estis la Kemi-fibra Korporacio Yizheng (Jiĝeng), plej granda produktejo de kemi-fibroj en Ĉinio, Ĝenerala Fabriko de Aŭtobusoj kaj Aŭta Fabriko Yizheng. Fine de 1993 la nombro de tiaj entreprenoj atingis 36. Inter ili la vendosumo de la Limigita Kompanio de Fridigaj Instalaĵoj Chunlan superis 3 miliardojn da juanoj.

La kompanio estas en la malgranda urbo Taizhou (Tajĝou)

sur la Ebenaĵo de Norda Jiangsu (Ĝjansu)-provinco. Meze de la 80-aj jaroj ĝi estis malgranda fabriko kun jara produktovaloro de nur 5 milionoj da juanoj kaj liveris 40 specojn da produktoj, unu el kiuj estis klimatizilo. Kun la leviĝo de la viv-nivelo de la ĉina popolo aperis granda merkato de porhejmaj klimatiziloj. En la fino de 1986 fabrikestro Tao Jianxing (Taŭ Ĝjanŝing) proponis produkti klimatizil-seriojn kaj planis la disvolvan projekton por kvar jaroj. En 1990 realiĝis lia plano kaj la kompanio Chunlan fariĝis la unua granda entrepreno de klimatiziloj de Ĉinio. Poste li kaj liaj kolegoj elkovis la duan projekton, ke en 1994 la jara produktovaloro atingos miliardon da juanoj. Nun tiu projekto antaŭtempe realiĝis.

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE YANGZI-RIVERO



Krom klimatiziloj, la kompanio produktas ankaŭ motorciklojn. Nun ĝi havas la kapablon produkti 100 000 motorciklojn jare. En 1995 ĝi produktos milionon da klimatiziloj kaj certan kvanton da motorcikloj. Nun ĝi liveras ankaŭ aliajn produktojn, kiaj senhumidigiloj kaj kemi-industriaj kompletigiloj.

Je mencio pri la estonta plano de la kompanio, s-ro Tao Jianxing, kiu nun funkcias kiel ĉef-direktoro de la kompanio, diris: "Eĉ kiam la vendosumo atingos 10 miliardojn da juanoj, nia kompanio estos ankoraŭ malgranda, ekster la vico de 1 000 grandaj kompanioj de la mondo. Nia celo estas, ke nia kompanio enviciĝu inter la grandaj kompanioj de la mondo en la proksima estonteco."

YANGZHOU IRU AL LA MONDO

Yangzhou situas en la Delto de Yangzi-rivero, kies ekspluatadon la ĉina registaro decidis rapidigi. Ĝi havas avantaĝojn de situo, riĉfonto kaj ekonomio. Kiel kapti la ŝancon, por ke Yangzhou iru al la mondo? Pri tio s-ro Shi Guoxing diris: "Kial la kompanio Chunlan akiris grandan progreson? Unu el la spertoj estas koncentri siajn fortojn por efektiviĝi la difinitan celon. Do, kio estas la celo de Yangzhou? Ĝenerale, ni partoprenos en la internacia granda cirkulo kaj plene disvolvos por-eksteran ekonomion. Samtempe ni eniros la internacian merkaton en ĉiuj flankoj kaj liveros eksterakomercajn varojn en valoro de 30 miliardoj da juanoj en 2000.

Konkrete, ni celas disvolvi industriojn de altaj kaj novaj teknikoj kaj ekspluati ĉefe jenajn produktojn, kiaj daten-regataj ŝipoj, kontenoroj, daten-regataj ilmaŝinoj kaj

daten-komunikaj sistemoj, por renovigi la teknikan kaj produktan strukturon de industrio en tuteco. Krome, ni devas ankaŭ plibonigi la investan medion, rapidigi la konstruadon de bazaj instalaĵoj kaj havigi la modernan trafikan sistemon kun interligo de akvoĵojo, ŝoseo, fervojo kaj aeroĵojo. Por tiu ĉi celo, en nia urbo estas konstruata la Yangzhou-a parto de la Nankin-Nantong-a Fervojo kaj konstruata la Jiangyin(Ĝjangjin)-Jingjiang(Ĝingĝjang)-a Pontego super Yangzi-rivero."

AVANTAĜOJ DE ZHENJIANG

Zhenjiang (Ĝengĝjang) sude de Yangzi-rivero estas antikva urbo. Antaŭ miloj da jaroj Yangzi-rivero formis delton en sia en-



Laborantoj de Zhenjiang-haveno kaj belga ŝipano (la tria de dekstre)

fluejo, kie poste aperis la urbo Zhenjiang.

Zhenjiang famas pro la populara ĉina legendo "Blanka Serpento". Ĝi rakontas, ke Blanká Serpento sopiras al la vivo en la homa mondo kaj deziras esti ordinara homo. Ĝi venis en la homan mondon kaj transformiĝis en belan knabinon. Ŝi enamiĝis al junulo Xu Xian (Ŝju Ŝjan) kaj edziniĝis al li. Tamen bonzo Fahai de la templo Ora Monto perforte subfosis ilian amon. Foje Xu Xian pilgrimis al la templo kaj estis malliberigita de la bonzo. Por savi Xu Xian la Blanka Serpento subakvigis la Oran Monton kaj fine estis subpremita de Fahai sub pagodon. De multaj jaroj la legendo forte kortuŝas la geamantojn kaj la Ora Monto allogas sennombrajn vojaĝantojn.

En la regadejo de la termoelektrajo Jianbi





Zhenjiang-haveno ĉe sunsubiro

Foto de YAN JIN

Iasence la monto estas simbolo de Zhenjiang.

Rilate al la ekspluatado de la ekonomia zono de Yangzi-rivero, Zhenjiang havas siajn proprajn avantaĝojn, t.e., sufiĉajn akvokaj elektro-energiojn, vastan teron, facilan trafikon kaj kompletigitajn instalaĵojn.

Zhenjiang, kun 9 ankrejoj por 25 000-tonelaj ŝipoj, estas la tria granda haveno de Yangzi-rivero, post Nankino kaj Wuhan. D-ro Sun Yatsen, pioniro de la ĉina demokratia revolucio, prezentis en sia "Projekto por Konstrui la

Respublikon" la planon konstrui Zhenjiang en grandan havenon de la Oriento. Zhenjiang situas ĉe la kruciĝejo de la Granda Kanalo kaj Yangzi-rivero, kie regas facila akva trafiko. En la urbo etendiĝas ŝoseoj en ĉiuj direktoj, kaj triono de la 240-kilometra ekspresa aŭtovojo de Ŝanhajo al Ningbo sin trovas en Zhenjiang. La konstruota ekspresa fervojo de Ŝanhajo al Ningbo kun rapideco de 220 km/h trakuros la urbon. Ankaŭ la konstruado de Zhenjiang-Yangzhou-a "Pontego super Yangzi-rivero estas planata. Post la finkonstruiĝo la trafi-

ko en la urbo fariĝos pli facila.


En la urbo funkcias 60 000 program-regataj telefonaj lineoj. Kaj krome, funkcias ankaŭ cirkulantaj telekomunika centro kaj telefona reto. La tiea komunikado estas pli facila ol antaŭe. En Zhenjiang estas Jianbi-termoelektraj, la plej granda en Ĉinio, kun generatora kapacito de 1.625 milionoj da kilovattoj kaj la konstruado de nova elektraĵo kun generatora kapacito de 2.4 milionoj da kilovattoj estas en preparado. Cetere, la urbo havas sufiĉe vastan teron por sin disvolvi. ■



Sur Zhenjiang-kajo




Promenejo en Yangzhou




En laborejo de la kemifibra korporacio Yizheng

Foto de LU YI



Produktol-
nio de kli-
matiziloj en
la kompanio
Chunlan



Bredado de pektenoj

JIANG SHILIANG:

Kulturado kaj bredado en maro

La maro ĉiam estas rava. En la pasintaj 30 jaroj la disvolviĝo de la mara kulturado kaj bredado profundigis la koncepton pri mara valoro.

KULTURADO KAJ BREDADO EN MARO

Inter la maraj riĉfontoj la biologia riĉfonto estas aparte valora. Laŭ kalkulo, ĉiujare la maro produktas 135 miliardojn da tunoj da organika karbono, kiuj povas turniĝi en tri miliardojn da tunoj da marproduktaĵoj. La tero povas vivteni apenaŭ 10 miliardojn da homoj per siaj riĉfontoj, se kun la maraj riĉfontoj, ĝi povas vivteni ĉ. 30 miliardojn. Kiel biologia trezorejo, la maro estos grava fonto de proteino bezonata de la homaro en la 21-a jc.

Tamen, nun oni povas fari nenion kontraŭ plejparto de la maraj riĉfontoj, limigite de la tekniko, sed la estaĵoj en la proksimaj malprofundaj maroj malmultiĝas kaj eĉ proksimiĝas al perejo pro troa kaptado. Tial aperis la mara kulturado kaj bredado.

Biologoj pri maro opinias, ke esence oni povas fari kulturadon kaj bredadon en maro kiel sur la tero, tiel ke grandamplekse plialtiĝos la nivelo de produktado de la naturaj riĉfontoj per specifa tekniko. Ĉina algologo prof. Zeng Chengkui prezentis la ideon pri kulturado kaj bredado en maro. Li opinias, ke la mara kulturado kaj bredado finfine anstataŭos fiŝkaptadon.

KULTURADO DE MARAJ ALGOJ

Kulturado de maraj algoj estis plej frue farata en

la mara kulturado kaj bredado de Ĉinio.

La algoj, malaltklasa kreskaĵo, vivas en maro, rivero, lago kaj tero. Grandaj maraj algoj estas ĉefe ruĝalgoj, brunalgoj kaj verdalgoj, ekz., laminario kaj porfiro (*Porphyra*), kiuj enhavas multe da jodo kaj estas manĝeblaj kaj uzataj oficinale. Kiel primaraj produktantoj en akvo, la algoj ludas gravan rolon en cirkulado de materio kaj energio en biosfero. Sed pro troa kolektado, la algoj malrapide reproduktiĝas kaj ne sufiĉas por la bezono. En tiaj cirkonstancoj, jam en la 50-aj jaroj ĉinoj komencis studi maran kulturadon kaj nun estas fondita en Ĉinio entrepreno por kulturi marajn algojn, la plej granda en la mondo. La produktokvanto de laminario okupas la unuan lokon en la mondo, superinte la totalan produktokvanton de algoj de aliaj landoj. La ĉina prilabora industrio de maraj algoj rapide disvolviĝas. Ekz., serio da manĝaĵoj el laminario multe helpas solvi la problemon pri jodomanko de 400-500 milionoj da ĉinoj en la landinterno. Porfiro ne nur enhavas jodon, sed ankaŭ estas manĝaĵo kun hiperproteino kaj hipograso. Japanoj tre ŝatas ĝin kaj havas dekojn da kuirmanieroj pri ĝi.

PRODUKTADO DE MIKROALGOJ

Krom grandaj algoj, estas ankaŭ unuĉelaj mikroalgoj, manĝaĵoj de fiŝoj, salikokoj kaj konkuloj. La produktado de mikroalgoj okupas gravan lokon en la mara kulturado kaj bredado. La ĉefa produktaĵo

(Daŭrigo sur p. 33)



Zhang Chunhe (maldekstre) kaj Zhang Xu

ARTOJ DE ĈINIO

Nuntempaj Dongba-aj penetraĵoj

de LI QIANG

KUN ĉ. 280 000 membroj, Naŝi-nacio, unu el la ĉinaj nacimalplimulto, havas sian apartan ĉarmon. Tion pruvis ne nur tio, ke ĝi havas sian propran lingvon, sed ankaŭ siajn proprajn ideogramojn, kaj pli grave estas, ke ĝi kreis Dongba-kulturon kun mistera koloro.

Naŝi-oj plejparte loĝas en montaroj ĉe la supra baseno de Yangzi-rivero. Dongba-kulturo devenis de Dongba-religio, primitiva nacia religio radikiginta en la montaroj. Ĝi temas pri ideogramo, pentrarto, muziko, danco kaj aliaj kampoj. La pli ol mil volumoj da klasikaĵoj de Dongba-kulturo estas la enciklopedio pri la antikva socio de Naŝi-nacio. La lingvo konsistas el 1 300 hieroglifoj. Pro tio, ke la Dongba-klasikaĵoj ankoraŭ cirkulas en Naŝi-nacio, la Dongba-aj hieroglifoj estas nomataj vivaj hieroglifoj.

La Dongba-a pentrarto devenis unu flanke de la antikvaj Dongba-aj hieroglifoj kaj aliflanke de la enhavoriĉaj religiaj aktivadoj. Ekz., en tiuj aktivadoj, oni ne nur recitis sutrojn, sed ankaŭ sin alivestis kiel diversajn diojn, budhojn, personojn, bestojn, vegetalajn kaj diablojn. Tiuj figuroj pentritaj de artistoj fariĝis temo de Dongba-aj penetraĵoj. Kiel antikva religia pentrarto, la Dongba-aj penetraĵoj estas la plej primitiva kaj plej tipa arta heredaĵo de la antikva kulturo de Naŝi-nacio.


En la lastaj jaroj aperis en la ĉina pentrarta rondo moderna Dongba-a skolo, kies membroj ĉefe estas junaj kaj mezaĝaj Naŝi-aj pentristoj. Lerninte bonajn de la tradicia Dongba-a pentrarto, ili denove taksis la antikvan nacion kaj ĝian antikvan kulturon per moderna penso kaj pli kuraĝe skizis bildojn plenajn de freŝa epoka etoso kaj nacia gusto. La modernaj Dongba-aj penetraĵoj montris per siaj riĉaj enhavoj la longan historion de la Naŝi-oj kaj iliajn morojn, amon kaj strebadon al la vivo. Eble pro tiu nacio, tiu religio aŭ tiuj penetraĵoj mem, la modernaj Dongba-aj penetraĵoj vekis ekde sia apero grandan atenton en la ĉina kaj alilanda pentristaj rondoj.

Kvankam la juna Naŝi-o Zhang Chunhe loĝis plurajn jarojn en Pekino kaj sisteme kaj solide lernis arton en pekina altlernejo, tamen li ne povis forgesi sian infanecon, nek la religiajn aktivadojn en la hejmloko, nek la hieroglifojn similajn al penetraĵoj. Pro ĉio tio li prenis penikon por la Dongba-a pentrarto kaj fariĝis fondinto de la skolo de moderna Dongba-a pentrarto.

Li diris: “Mi provis kunigi mian koron kun granda kaj mistera universo por esprimi la spurojn de la merito inter la vivo kaj la morto, la vero kaj la falso, la bono kaj malbono. Miaj prapatroj kreis la magiajn kaj ĉarmajn Dongba-ajn hieroglifojn kaj pentrarton pro sia kredo; dum mi, pro mia amo al arto, altiras per mia kora esprimo la homojn en mian sentan mondon.” Dank’ al tiu sento, Zhang Chunhe verkis penetraĵon “La Vivo”. Sur la penetraĵo estas Dongba-aj hieroglifoj “vivo” (sube dekstre), “krei la vivon” (ĉefa bildo), “dio”, “suno”, “hejmo” kaj “prapatro” (supre maldekstre, de maldekstre al dekstre). La strangaj figuroj kaj densaj koloroj karakteriziĝis per romantika koloro.


Zhang Xu, unika pentristino de la skolo de la moderna Dongba-a pentrarto, estas han-naciano. Ŝi naskiĝis kaj kreskis en Pekino. Foje ŝi vojaĝis por skizado en Lijiang, kie loĝas Naŝi-oj. Kiam ŝi venis al tiu ĉarma loko, ŝi estis fascinita de la tieaj naturaj pejzaĝoj, la honesteco de la popolo kaj la antikva Dongba-a kulturo. Ŝi fariĝis adopta filino de paro da Naŝi-aj geedzoj kaj ili donis al ŝi Naŝi-an nomon. Tiu hazarda vojaĝo incisis ŝin en verkadon de Dongba-aj penetraĵoj, kaj de tiam ŝi jam komplete absorbiĝis en tiu arto.

“Pajla Ĉapelo de Prapatro”, karakteriza verko de Zhang Xu, montris al ni dancanton. Tiu estas signo de prapatro en hieroglifo. Li staras sur la pinto de la neĝa Yulong-monto, rigardas al la suno levata de sanktaj flamoj. La suno similas al la pajla ĉapelo plektita de ŝia Naŝi-a patrino. En tiu natureca kaj liberstila penetraĵo ardas la amo de Zhang Xu al la Naŝi-a popolo. ■



"Pajla Çapelo de Prapatro"

de ZHANG XU




"Sankta Lumo"

de ZHANG CHUNHE


"La Dio de la Amo"


de ZHANG XU



"Regno Forgesita"

de ZHANG XU





"Lukto"

de ZHANG CHUNHE

Longviveco ne estas revo

EN la 13-a Internacia Medicina Konferenco okazinta en Tokio novembre de 1991 Bama-gubernio de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono de Ĉinio estis konfirmita kiel regiono de longvivuloj, post Hunza de Pakistano, Vilcabam de Ekvadoro kaj Xinjiang (Ŝingĝang) de Ĉinio.

Statistiko diras, ke en Bama vivas 69 pli-ol-cent-jaraj maljunuloj, kiuj konsistigas 0.0308% de ĝia loĝantaro. Krome, tie vivas 226 90-99-jaraj maljunuloj kaj 1 724 80-89-jaraj maljunuloj. Inter la regionoj de longvivuloj Bama distingiĝas per tri evidentaj trajtoj: unue, la procentaĵo de pli-ol-cent-jaraj maljunuloj de Bama rilate al la loka loĝantaro estas pli granda ol tiu de la aliaj tri lokoj; due, longvivuloj de Bama plejparte estas viglaj en pensado, kaj triono de ili ankoraŭ havas la kapablon labori, dum tiuj en la aliaj lokoj plejparte nur povas zorgi pri sia ĉiutaga vivo; trie, Bama sin trovas en subtropika zono (106°51'-107°23'E, 23°50'-24°23'N, dum la aliaj lokoj de longvivuloj dislokiĝas en malvarmaj lokoj.

Bama-anoj vivas en ĉiamverda loko kun freŝa aero, prenas ĉefe vegetalajn manĝaĵojn kaj preskaŭ ne drinkas. Krom tiuj kaŭzoj, ĉu estas alia mistero de la longviveco de Bama-anoj?

Esplorado de medicinistoj montris, ke anaerobiaj bakterioj estas la ĉefa konsistiga parto de la bakteriaj grupoj en la korpo de Bama-aj longvivuloj, kaj inter la ĉefaj bakteriaj grupoj bifidobaciloj okupas gravan lokon. Medicina raporto de 1993 diras, ke post eksperimento oni trovis, ke bifidobacila kvanto en la korpo de Bama-a longvivulo atingis 10^8 - 10^{10} . Tio pruvis, ke li ankoraŭ konservas la vivecon egalan al tiu de mezaĝulo, eĉ tiu de bebo nutrata per homa lakto. Tio devas esti la vera kaŭzo de la longviveco de Bama-anoj.

Bifidobacilo estis eltrovita antaŭ cent jaroj. En 1899 franca medicinisto Tissier trovis en esplorado, ke en komparo kun malforta bebo, sana bebo nutrata per patrina lakto havas bifidobacilojn en la korpo absolute multajn, t.e. ili konsistigas 95% de la bakteriaj grupoj. Poste Tissier faris multjaran eksperimenton. En 1906 li unuafoje elkulturis bifidobacilojn en vianda supo kaj sukcesis nutri bebojn per ili.

En 1950 prof. Wei Xi (Ŭej Ŝji), fama ĉina mikroekologo, kuracis malsanulon suferantan febron kaŭzitan de mordo de rato. La paciento mortis. Prof. Wei Xi dissekis lian kadavron. Estis mirinde, ke malsaniga infektilo jam ne plu estis en la kadavro,

male pulmo-inflamaj baciloj grandnombre kreskis en ĝi, kio kaŭzis al la malsanulo septicemion kaj poste morton. Kaj prof. Wei Xi unuafoje prezentis laŭ la vidpunkto de mikroekologio novan medicinan tezon, ke "perturbo de la konsisto de bakteriaj grupoj" kaŭzas malsanon kaj morton al homoj.

De post tiam, mikroekologio pri homa korpo rapide progresis, kaj la esploraj fruktoj mirinde identiĝas kun la aserto de prof. Wei Xi.

Mikroekologia esplorado malkovris, ke en la korpo de ĉiu homo vivas dekmiloj da miliardoj da mikroboj, kiuj plejparte estas necesaj por la aktivado de la homa korpo, i.a. 95% de ili estas bifidobaciloj. La esplorado ankaŭ montris, ke la kvanto de bifidobaciloj en la homa korpo estas intime ligita kun la kresko, organisma metabolo, maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto de homo. Infano nutrata per patrina lakto estas pli sana ol tiu nutrata per bovina lakto, ĉar la bifidobacila kvanto en la korpo de la antaŭa estas dekoble pli granda ol tiu de la lasta. La bifidobacila kvanto en la korpo de sana homo estas 50-oble pli granda ol tiu de malsanulo kaj la bifidobacila kvanto de sana pli-ol-cent-jara maljunulo estas centoble pli granda ol tiu de ordinara maljunulo.

Kutime bifidobaciloj pace kunekzistas kun la aliaj bakteriaj grupoj, kune stabiligas kaj reguligas la mikroekologian ekvilibron de la homa korpo, kaj tiel la homa korpo povas esti en bona sanstato. Tamen, kiam oni malsaniĝas, kadukiĝas, ricevas radio- kaj kemi-terapiojn, uzas aŭ trouzas antibiotikon, la bifidobacila kvanto en la homa korpo draste reduktiĝas kaj la homa korpo perdas sian ekvilibron. Tiam malutilaj bakterioj, kaptante la okazon, eniras en la homan korpon, multiĝas en ĝi kaj malsanigas ĝian organismon. Ekz. infanetoj povas suferi karencon, sekundaran infektiĝon, anahematiopoezon kaj malrapidan kreskon de intelekto kaj korpo kaj plenkreskuloj povas suferi ĉelan kanceriĝon, misfunkciadon de intesto kaj hepato, endogenan infektiĝon kaj maljuniĝon de hepato, reno kaj haŭto.

Surbaze de la supre menciitaj esploraj rezultoj la internacia medicina rondo jam en la 60-aj jaroj prezentis kuraĝan imagon: Se la kvanto de bifidobaciloj en la homa korpo povas ĉiam esti 10^{16} , kiom en la korpo de bebo nutrata per patrina lakto en unu semajno post la naskiĝo, do la meza vivdaŭro de la homoj atingos pli ol 140 jarojn.

La sciencistoj nun strebas por fari bifidobacilojn aktiva preparaĵo per biologia tekniko kaj aldoni bifidobacilojn al la homa korpo per trinkaĵo el tia preparaĵo cele altigi la organisman imunecon kaj longigi la homan vivon. ■



Subĉiela krakmanĝejo Foto de LU JIAXIANG

SUR STRATOJ

La Nankina Strato en Ŝanhajo

Fotoj de LIU SIGONG

Nokte, kiam mi staris sur la supro de la 164-metra Portman-hotelo, la plej alta loko de Ŝanhajo, kaj havis panoraman vidon de la urbo, antaŭ mi sternaĝis oranĝa rivero de lamplumo. Ĝi estis la plej movoplena Nankina Strato en Ŝanhajo.

La Nankina Strato en Ŝanhajo havas historion de pli ol 100 jaroj. Nun la strato, kiel simbolo de la urbo, estas la plej vigla komerca strato de Ĉinio. Ambaŭflanke de la kvin-kilometra strato viciĝas sennombraj butikoj kaj magazenoj. Sur la plej movoplena centro de Ŝanhajo interkruciĝas la Nankina kaj Tibeta Stratoj. Ĉiutage al la strato venas 1.5 milionoj homoj por aĉetado. La loko estas la plej granda staplejo de podetalaj varoj kaj ankaŭ la plej granda centro de komercaj informoj de Ĉinio.

En la lastaj jaroj preskaŭ ĉiuj malnovaj butikoj kaj magazenoj sur la strato estis rekonstruitaj kaj ĝia nova fizionomio allogas pli kaj pli multajn vizitantojn.



Ĝojaj turistoj veturantaj sur la strato
Foto de YU
XIAOMING



La Nankina Strato en intenseco

Foto de LU JIE


Kiam la magazeno ne estas malfermita...



En vestovendejo



La Nankina Strato en nokto



Pri krimado de ĉinaj geknaboj

de XIAO NAN

KIEL multaj aliaj landoj, Ĉinio vizaĝas al la socia problemo pri krimado de geknaboj. En la 90-aj jaroj grandiĝas la nombro de malpli-ol-25-jaraj geknaboj-krimuloj, malgraŭ necesaj rimedoj alprenitaj de la registaro.

MALTRANKVILIGA STATO

Referaĵo pri la nunaj sociaj problemoj de Ĉinio montras, ke antaŭ la 70-aj jaroj la geknaboj-krimuloj konsistigis nur 20-30% de la totala nombro de la krimuloj en Ĉinio. Tiu proporcio estis la plej malgranda en la mondo. Sed post 1972 iom leviĝis la proporcio. En 1980 Ĉinio havis 360 000 geknaboj-krimulojn kaj en 1990 la nombro kreskis 1.26-oble, kompare kun tiu en 1980.

La materialo resumas la ĉefajn trajtojn de la krimado. Ili estas jene:

1. Malgrandiĝas la aĝo de krimuloj. Ok-naŭ-jaraj infanoj fariĝis konstantaj ŝtelistoj kaj malpli-ol-14-jaraj knaboj ofte faris rabadon kaj friponaĵon.

2. Grandiĝas la nombro de junaj krimulinoj. La reformado kaj pordomalfermo de Ĉinio ebligas al la virinoj vaste partopreni la socian vivon. Sed multiĝis la ŝancoj por ili fari krimadon. Krom la seksaj, ankaŭ ekonomiaj krimoj de virinoj estas atentindaj. Multe da junulinoj venis al urboj por serĉi laboron, kio iagrade grandigis la nombron de krimulinoj.

3. Kreskas la nombro de vagantaj krimuloj. La migrado de loĝantoj rapidigas la socian progreson, sed donas al vagantaj krimuloj pli da ŝancoj fari krimadon kaj malfaciligas la administradon de la publika sekureco.

4. Kreskas la nombro de krimulaj grupoj, ĉar la partieca penso ekkoviĝas inter geknaboj.

5. Montriĝas furiozeco kaj krueleco de krimado. Geknaboj estas ekscitiĝemaj kaj koleremaj. Ili facile kverelas, eĉ ponardas aliajn pro bagatelo.

6. Krimuloj en la urboj estas pli multaj ol tiuj en la kamparo. En la urboj monadorado kaj hedonismo disvastiĝas pli rapide ol en la kamparo, kio puŝas urbajn geknabojn sur la vojon de krimado.

Cetere, la disvolviĝo de la nigra socio kaj plimultiĝo de modernaj rimedoj fari krimadon influas geknabojn negative.

Laŭ statistiko, 70-80% de la krimagoj, faritaj de

geknaboj en 1993, estis ŝteloj kaj raboj.

KOMPLIKAJ SOCIAJ FAKTOROJ

Kvankam la krimuloj konsistigas nur malgrandan parton de la totala nombro de la geknaboj, tamen la tendenco estas neniel neglektenda. La krimadon kaŭzis politikaj, ekonomiaj, kulturaj, edukaj kaj moralaj faktoroj de la socio.

Nun kun la profundiĝo de la reformado kaj pordomalfermo en Ĉinio, neeviteble aperas iuj nenormalaj sociaj fenomenoj. Ankoraŭ ne perfektigas la edukado de familio, lernejo kaj socio, kiu gravas por kreskigi la geknabojn. Kiel ekzemple, iuj solinfanoj estas tro dorlotataj de siaj gepatroj kaj havas malbonajn kutimojn; iuj lernejoj neglektas moralan edukon; la monadorado kaj hedonismo en la socio kaj la diro, ke lernado taŭgas por nenio, malbone influas lernantojn.

Manko de labor-ŝancoj por geknaboj estas alia kaŭzo. Laŭ statistiko, de la fino de la 80-aj jaroj ĝis la komenco de la 90-aj jaroj Ĉinio havis ĉ. 300 milionojn da geknaboj en la aĝo de 14-25 jaroj. Laŭ kalkulo la stato daŭros dek jarojn. Nun la ĉina registaro ankoraŭ ne povas doni al ili tiom da laborŝancoj. Rezulte de tio, estiĝos minaco kontraŭ la sekureco de la socio.

MORALA EDUKADO — LA RADIKALA ELIRO

Por solvi la problemon pri krimado de geknaboj la tuta socio devas fari ĉion eblan. Julie de 1993, la Esplora Centro pri Nuntempaj Problemoj de Ĉinio kaj la Fonduso de Scienc-teknika Progreso de Ĉinio okazigis en Pekino kunsidon sub la temo "Krimado de Geknaboj kaj Morala Edukado". La ĉeestantoj varme diskutis pri la kaŭzoj de la krimado kaj pri la solvoj de la problemoj.

Prof. Tian Sen de la centro opiniis, ke la radikala kaŭzo de la krimado estas perdo de moralo. La kontraŭleĝa posedo, seksa atenco, venĝemo, turmentado k.a. estas senescepte kaŭzitaj de la malforteco de moralo.

La ĉeestantoj unuanime opiniis, ke fortigi la moralan edukadon al geknaboj kaj intensigi la moralan kulturadon de la socio estas la radikala rimedo por solvi la problemon.

(Daŭrigo de p. 8)

tran koston. Tio montris, ke kiam la ĉinaj filmoj finfine estas puŝitaj al la merkato, ĝi jam ne ekzistas. Alivorte, la merkato jam fariĝis abismo englutanta grandan nombron da investita monsumo por filmoj.

Kvankam por la ĉinaj filmoj estas malfacile iri al la merkato, tamen ĉiuj komprenas, ke la problemo kuŝas en la malnova sistemo. La filma afero bezonas grandan monsumon. Unu ordinara filmo konsumas preskaŭ milionon da juanoj, egale al la jara produktovaloru de mezgranda entrepreno. En la lastaj dekelkaj jaroj Ĉinio produktis ĉirkaŭ 150 filmojn ĉiujare. Almenaŭ duono de ili ne povis repreni la produktokoston, ĉar la studioj ne rekte vizaĝis al la merkato kaj ne bezonis respondeci pri deficino. Se daŭros la fenomeno, la ŝtato suferos de malprofito, la studioj perdos la labor-entuziasmon

kaj la ĉinaj filmoj eble pereos.

Rekte vizaĝe al la merkato, la studioj povas produkti pli multe da elstaraj filmoj. Ekde la fino de la 80-aj jaroj la studioj donas atenton al produktado de amuzaj filmoj. Sed dum longa tempo la studioj kaj filmistoj neniam zorgis pri studo de la filma merkato, malĝuste opiniante, ke amuzo signifas intrigojn pri batalo kaj murdo. Ĝuste granda nombro da tiaj filmoj kaŭzis malprosperon de ĉinaj filmoj. Nemultaj filmoj ŝatataj de spektantoj pruvis, ke oni fakte bezonas gajan distriĝon kaj artan ĝuon anstataŭ trivialan stimulon. Nur se la studioj diligente laboras por produkti filmojn bonajn en amuzo kaj ideologio, ili povos firme stari en la merkato.

En 1994 la ĉinaj filmoj nepre iros al la merkato. Kvankam en la pasintaj 40 jaroj Ĉinio neniam iris tiun vojon, tamen kiel iu ĉina reĝisoro diris, Ĉinio puŝos siajn studiojn al regula produktado de filmoj kaj prezentos ilin al la mondo. ■

(Daŭrigo de p. 24)

estas algopulvoro, uzata kiel manĝaĵo, brutonutraĵo, sterko kaj krudmaterialo por kemi-industriaj kaj biokemiaj produktaĵoj. Nun oni provas enkonduki ellasitan akvon en maran nutraĵan ĉenon, por ke la mikroalgoj purigu la akvon kaj samtempe produktu proteinojn. La kulturitaj mikroalgoj povas esti uzataj kiel nutraĵo de konkuloj. Ekz., ĉinaj sciencistoj preparis nutraĵon el spiralaj mikroalgoj por pektenoj, fiŝoj kaj salikokoj. Tiu ĉi tekniko estas disvastigata kaj donas bonan frukton. La multe produktataj mikroalgoj en la mondo estas ĉefe spirala kaj aliaj. La spirala mikroalgo estas nomata ankaŭ futura manĝaĵo kaj supermanĝaĵo. Ĝi entenas multspecajn nutroelementojn kaj havas racian konsiston de aminoacido. Iuj landoj produktas sanigan manĝaĵon el ĝi.

En la pasintaj jaroj la gena inĝenierio de algo montris sian perspektivon, dank' al la disvolviĝo de la gena inĝenierio. Oni provas elpreni el algoj bonkvalitajn genojn, kiaj proteina geno kaj azotobakteria geno, por plibonigi la kvaliton de raso de agrikulturaj plantoj. Oni provas meti en kulturatajn laminariojn kaj porfirojn proteinajn genojn kun valoro de medicino kaj ekonomio por produkti proteinan preparaĵon, eble kun kosto malpli granda ol tiu de mikroba fermento.


BREDI SUPERFIŜON PER GENA INĜENIERIO

Bredado de konkuloj kaj fiŝoj donas pli grandan profiton. Ekz. Ĉinio jam sukcesis kulturi en sia maro usonajn pektenojn, sed ilia karno estas malpli bona ol tiu de lokaj pektenoj plenkreskintaj en 2-3 jaroj.

Ankaŭ disvolviĝas la bredado de maraj fiŝoj. La raraj marfiŝoj, kiaj pagrosomo (*Pagrosomus major*) kaj paralikto (*Paralichthys olivaceus*), estas nutroriĉaj. Sed estas malfacile grandkvante bredi ilin pro tio, ke ili kreskas malrapide kaj estas karnovaraj. Fakuloj sukcese elprenis el la korpo de bovo aŭ fiŝo genon de kreska hormono kaj transmetis ĝin en la korpon de dolĉakva fiŝo kaj salmo por rapidigi ties kreskon. Poste oni transmetis tiun kreskan hormono en la fekundigitan ovon de pagrosomo kaj paralikto por kulturi novajn speciojn. Se la provo sukcesos, tio donos grandan profiton al la kulturado de raraj marfiŝoj. Ĉinaj sciencistoj la unuaj elkulturis transgenan superfiŝon, kiu havas grandan korpon kaj kreskas rapide. Sciencistoj de Ĉinio kaj Kanado kunlabore elprenis la frostorezistan genon el pleŭronekto, marfiŝo kun frostorezista geno, kaj sukcese transmetis ĝin en la korpon de la atlantika salmo kaj orfiŝo sen frostorezista geno. ■

La ĉina registaro ĉiam prenas la batalon kontraŭ la krimagoj de geknaboj kaj moralan edukadon kiel gravan konsistigan parton de la spirita civilizacio. Septembre de 1991, ĝi ekpraktikis la "Leĝo por Protekti la Neplenaĝulojn de la Ĉina Popola Respubliko", kaj en la diverslokaj juĝejoj de Ĉinio estis


starigitaj specifaj tribunaloj kaj la juĝ-sistemo pri geknaboj jam havis rudimentan formon. Kredeble, se nur la familio, lernejo kaj socio prenos sur sin la respondecon, aperos do medio favore al la kreskado de la geknaboj kaj malmultiĝos la krimagoj de geknaboj. ■



Pitoreska Wuyi-monto

Fotoj de LI CHUNGENG

Jiuqu-rivero kaj Yunü-montpinto



Vojeto sur monto

La flughaveno plivastigita






Dawang-montpinto en nebulo

Wuyi-monto en nordokcidenta Fujian-provinco estas naturdotita pitoreskejo de Ĉinio. Ĝi estas unu el la ŝtataj turismaj lokoj. La montregiono en spaco de 70 kilometroj famas pro siaj belformaj montpintoj kaj klaregaj fontoj.


En la pasinteco Wuyi-monto ne estis bone konata de la homoj pro izoliteco. En 1982 la ĉina registaro decidis konstrui la regionon en ĉefan turisman pitoreskejon kaj rezervejon. Pli ol 30 milionoj da juanoj estis investitaj por necesaj turismaj instalaĵoj. Por konformiĝi al la kreskanta nombro de en- kaj eksterlandaj turistoj, oni plivastigis la flughavenon, ke ĝi povu akcepti Boeing 737 kaj alispecajn grandajn aviadilojn, kaj konstruis la duaklasan aŭtovojon Wuyi. Nun al la pitoreskejo venadas pli kaj pli multaj turistoj.

Parto de la urbo Wuyishan



DING RENREN:

EKSPEDICIO EN DEZERTO



La ruino de antikva kastelo en Mazar-tag


PRINTEMPE de 1895, fama sveda esploristo Sven Anders Hedin transiris de okcidente orienten Taklimakan, la duan grandan dezerton de la mondo, kiu kuŝas en Xinjiang (Ŝingĵang), Ĉinio. Li misaŭdis la vortojn de loka ĉiĉerono, ŝargis sian kamelaron per akvo sufiĉa nur por 4 tagoj kaj komencis sian vojaĝon. Li iradis sur la dezerto dekkelkajn tagojn, sed antaŭ liaj okuloj ankoraŭ estis senlima dezerto. Ne vidiĝis verdaĵo, nek akvo. Falis la kameloj kaj liaj kamaradoj unu post alia. Sven Anders Hedin pensis, ke la Morto certe atendas lin. Fiksante siajn okulojn al la stelplena ĉielo, li faris la lastan penton al la Dio. Subite aŭdiĝis krio de akvobirdo. “Se estas akvobirdo, certe estas akvo!” Li ekscitiĝis. Per sia tuta forto li rampis tien, kie kriis la akvobirdo. Antaŭ mateniĝo, li trovis grandan akvejon, kie fakte estas riverujo. Kun ĝojo li trinkis kaj revenis kun 2 botoj pleningitaj per akvo por savi siajn du lakeojn. Post tio ili direktis sin norden laŭ la seka riverujo kaj finfine eliris el Taklimakan.

La rivero, kiu savis Sven Anders Hedin, nomiĝas Hotan. La dezerto Taklimakan, kiu kovras 320 000 kvadratajn kilometrojn, similas al flava maro. La rivero Hotan trairas ĝin. La rivero estas sezona. En la ordinaraĵoj tie vidiĝas nur seka riverujo kaj nur en somero, kiam degelas la neĝo sur Kunlunmontaro, la akvo fluas al la montpiedo, sin ĵetas en la riverujon, iras tra la dezerto 300 km longa kaj finfine fluas en la riveron Tarim ĉe la piedo de Tianshan-monto.

Jam de antikve Hotan-rivero estis unika vojo al Taklimakan, Maro de la Morto. Por veni tien oni povas iri laŭ la riverbordo aŭ veturi per aŭtomobiloj kaj traktoroj tra la seka riverujo. Se oni soifas, oni fosas en la riverujo per ŝpato kaj tuj aperas akvo el la kavo. Tamen neniu aŭdis, ke oni iam ŝipveturis tien tra la dezerto. Hodiaŭ. ĉinaj esploristoj decidis la unuaj ŝipveturi tra la dezerto kaj nomis la ĉi-fojan ekspedicion “Ŝipo tra la Dezerto”.

La ekspedicio konsistis el 9 membroj. Ĝia estro estis Yan Jiangzheng (Jan Ĝjangĝeng). Ĝia vicestro estis Wang Wei (Uang Ŭej), kiu, kiel la ĉefa kunordiganto, ne endezertiĝis. Li Yueshi, fama esploristino de Hongkong, estis unika virino en la ekspedicio. Ŝi iam atingis Antarkton kaj Arkton kaj ankaŭ surgrimpis la montpinton Qomolangma. Ŝi estas unu el la malmultaj virinoj, kiuj faris tiajn aventurojn. La 50-jara s-ro Lu Duanzheng (Lu Dŭangĝeng), kiu laboras en la specimena kabineto de la Pekina Forstokultura Universitato, estis la plej maljuna membro de la ekspedicio. Fotisto Han Beisha, videoregistristo Sun Yang kaj mi, raportisto, estis 39-jaraj. Krom la supre menciitaj en la ekspedicio estis ankaŭ ŝoforo Li Xinmin (Li Ŝinmin) kaj interpretisto Maimaiti Ming, juna uĝuro.

Somere de 1993, kiam ni atingis Xinjiang kaj preparis nin por ŝipveturi, pluraj homoj diris al ni, ke la rivero Hotan estas tute netaŭga por ŝipveturado, ĉar en ĝi la akvo estis profunda nur ĝis la homa pieddorso. En la lastaj jaroj ĉe la supra baseno de la



En esplorado

rivero aperis pluraj akvokonservejoj, kiuj detenis grandan kvanton da akvo. Tial oni eĉ ne certigis, ĉu en la rivero estas akvo aŭ ne.

La onidiroj verŝigis super nian kapon kvazaŭ sitelo da malvarma akvo. Tamen la estro Yan persistis, ke la rivero estas taŭga por ŝipveturi. Lia aserto ja baziĝis sur la materialoj liveritaj de la Hidrologia Stacio Xiaota ĉe la ekstremo de Hotan.

Ĉu oni povas ŝipi en la dezerto? Kun suspekto nia ekspedicio suriris la ŝoseon kondukantan al la rivero Hotan la 12-an de aŭgusto. La ŝoseo rampis laŭ la okcidenta bordo de la rivero Karakax kaj sin etendis 100 km en la dezerton kaj malaperis ĉe la vilaĝo Huojian, la lasta loĝloko en la dezerto. La vojo estis pli kaj pli malfacila en la dezerto. Nia aŭtomobilo de tempo al tempo falis en la sablan mason kaj ni devis elaŭtiĝi por puŝi la veturilon antaŭen. Je la 9-a atm de la sekventa tago ni antaŭeniris nur 90 km en 9 horoj. Ni, morte lacaj, sidiĝis sur sablo kaj neniel volis iri plu. Tiam aŭdiĝis murmurado de rivero. Mi kaj s-ro Lu haste transgrimpis la sablan monteton. Antaŭ niaj okuloj aperis arĝenta rivero zigzaganta inter la ondantaj sablomontetoj. "Ho, Hotan-rivero!" "En Hotan estas akvo!" Tute forgesinte la lacon, ni eksaltis de ĝojo kaj hurais en la senlima dezerto. Ja ekbrilis espero por ŝipi en la dezerto!

En la tagmezo de la 13-a, ni atingis Mazartag, la startpunkton de nia ŝipveturado laŭ la plano, kaj la lokon, kie ni devas fari esploron. En la orienta ekstremo de Mazartag, ĉe la rivero Hotan, kuŝas ruino de antikva kastelo, konstruita de tubo-oj en la

7-a jc. Ni ascendis la kastelon kaj vidis, ke la muro estas ramita el laterito kaj branĉoj de poplo (*Populus diversifolia*). La kastelo estas pli granda ol signalturo sur la Granda Muro. Vidiĝas ankaŭ fornejo por kuiri manĝaĵojn siatempe. Oni diris, ke antaŭ nelonge oni elterigis multe da sagoj kaj kupraj moneroj ĉi tie. Ankaŭ ni volis trovi ion, sed vane. Mi informiĝis poste, ke unu semajnon post nia foriro pluvego faligis parton de la kastela muro kaj pro tio oni trovis multe da valoraj historiaj objektoj.

En la 4-a horo ptm en la ĉielo subite kolektiĝis densaj nuboj kaj post momento leviĝis ŝtormo. La ventego ŝetadis sablerojn kontraŭ nian vizaĝon, kio kaŭzis al ni akran doloron. Ni haste portis niajn objektojn en la tendon. Post nelonge ĉesis la pluvo, tamen la vento fariĝis pli kaj pli furioza. Ni devigite kaŝis nin en la tendo. Nokte abrupte malvarmiĝis la vetero. Ni tremis de frosto eĉ en la litosako. Antaŭe ni sciis nur, ke en la someraj tagoj ni devas nin gardi kontraŭ sunumado, neglektante gardi nin kontraŭ malvarmo. Kvietiĝis la vento. Ni tuj faris kampfajron. Ni sidiĝis ĉirkaŭ la fajro kaj sentis varmon en la brusto, kaj malvarmon sur la dorso.

Nia ekspedicio restis en Mazartag 2 tagojn. Estis feliĉe, ke en tiuj 2 tagoj la akvo en Hotan leviĝis pli ol 10 centimetrojn. Ni ja devis senprokraste kapti la ŝancon. Nia ekspedicio dividiĝis en du partojn: 5 el ni ŝipveturos en la rivero kaj ĉiuj aliaj daŭrigos sian vojaĝon laŭ la okcidenta bordo de la rivero por transiri la dezerton. Ni decidis renkontiĝi en la Hidrologia Stacio Xiaota.

Je la 11-a de la 15-a de aŭgusto mi kaj aliaj 4 kamaradoj komencis nian ŝipveturadon. Ni ŝipis per 2 kajakoj. Tiam la akvo en Hotan estis neprofunda, tamen fluis rapide. Antaŭ ni estis granda malfacilo: ruliĝis ondoj, rostis la suno kaj frostis la nokto. Tamen ni ne povis retiriĝi, ĉar ni ne havis sufiĉajn tempon kaj forton.

Ĉe la komenco de nia ŝipveturo en nia ekspedicio aperis 3 volontuloj, t.e. 3 hundoj de iu petrola prospektora grupo. La 3 bestoj estis el unu sama familio: patro kaj gefiloj. Ni pensis, ke ili forlasos nin, kiam niaj kajakoj ekmoviĝos, sed fakte ili sekvis nin pli ol 20 km. Ili jen kuris ĉe la bordo, jen naĝis en la rivero, kaj fine enŝipiĝis por dormi. Ni restigis ilin ĉe ni. Kompreneble, ni devis dividi kun ili niajn manĝaĵojn, tamen ili tre gajigis nian vivon. En la unua tago ili mordmortigis ŝafon de paŝtisto. Pro tio ni devis peti lian pardonon kaj kompensis al li la perdon. Malgraŭ tio, ni ŝatis la bestojn.

Hotan estas neimagebla! Ĝi havas plurajn branĉojn, ĉiu el ili larĝas 100-200 metrojn kun akvo malprofunda sed rapidkura. Ni veturis pli ol 10 kilometrojn kaj la branĉoj kunfluis en vastan flavan riveron, 2-3 kilometrojn larĝan. La aspekto ja estas impona. Se ni ne persone estus ĉi tie, ni ne kredus, ke en tiu seka mondo torentas rivero tiel larĝa!

La rivero estas malprofunda, sed ĉiu ĝia branĉo havas kompare profundan valetan kreitan de akvo-fluo. La kajakoj devis iri zigzage en la valetoj por ne grundis. La sablo-enteno de Hotan estas 2.7%. La akvo estas tute malklara kaj la riverfundo neklare videbla, do ni ne povis scii, kie estas la valetoj. Niaj kajakoj grundis foje refoje. Ni devigite eliris el la kajakoj por puŝi kaj tiri ilin. En la unua tago ni veturis 11 horojn, kaj niaj kajakoj grundis 50 fojojn.

En la tria tago ni ekhavis ian konon pri Hotan. Ni pririgardis la koloron de la akvo, ĝiajn krispojn kaj rebriladon, por distingi la profundecon de la akvo. Tial ni ne plu bezonis forte remadi, nek tiri la kajakojn. Ni povis ĝui muzikon eĉ kuŝante en la kajakoj.

La suno ja ne permesis nian distriĝon, ĝi senkompare rostis nin kaj de tio ni fariĝis sunbrunegaj. En la dua tago niaj nazpintoj senhaŭtiĝis. En la tria tago ni ĉiuj fariĝis makulplenaj en la vizaĝo. Haŭteroj komencis fali ankaŭ de sur la nudaj pieddorsoj, brakoj kaj brusto.

En la someraj tagoj la temperaturo varias senĉese. Tie ofte blovas vento, falas pluvo, leviĝas sabla ŝtormo kaj iafoje ankaŭ trombo. Ofte okazis, ke niaj kajakoj veturis sur akvo kaj flava sabla drako akompanis nin sur la bordo. Feliĉe, ke la larĝa rivero kaj la poplaro efike protektis nin.

La poploj estas la unikaj arboj en la dezerto. Ili kreskas malrapide, tamen la ligno estas malmola. En la senlima dezerto, kie ofte tiranas sablovento, ili kreskas fiere. Ĉiuj preterpasantoj admiras ilian ob-

stinan vivipovon. Sed ho ve, la poplaro, la tiel nomata verda koridoro en la verkō de Sven Anders Hedin, nun estas maldensa. En la arbaro ĉie troveblas velkintaj branĉoj, multaj altaj arboj estis hakitaj en la mezo, pro tio pli kaj pli forte tiranas la sablovento. La aspekto vekis triston ĉe ni. Krom la poploj tie kreskas ankaŭ tamarikoj kaj alhagoj (*Alhagi pseudalhagi*). Tamariko estas arbeto kun tre fortaj radikoj, kiuj povas firme teni la sabloteron en la tereno de dekelkaj metroj ĉirkaŭe kaj formi sablomasojn altajn je 3-5 metroj. Oni nomas ilin tamarikaj masoj. Survoje s-ro Lu trovis iun planton, similan al rinanto, kiun li neniam vidis. Fakuloj konstatis, ke ĝi estas plantido de tamariko. Lia trovo estis tre valora por ni.

La pluvo kaj vento prokrastis nian vojaĝon je 2 tagoj. Ni ja ne povis plenumi nian taskon en 7 tagoj laŭ nia plano. La 3 hundoj multe konsumis niajn manĝaĵojn. Eĉ se ni duone reduktis nian ĉiutagan manĝadon, niaj rezervitaj manĝaĵoj sufiĉis nur ĝis la 10-a tago. En la dezerto la plej malfacile akirebla estas trinkebla akvo. La akvo en Hotan-rivero estas tre malklara. Ni devis filtri ĝin, sed la filtriginta akvo sufiĉis nur por trinki. Tial kiam ni eliris el la dezerto, niaj vizaĝoj estis tute malpuraj.

Hotan fariĝis pli kaj pli malprofunda kaj la akvo-fluo malrapida. En la kvina tago ni antaŭeniĝis nur 20 km. Per tiel malgranda rapideco ni vagis aliajn 2 tagojn kaj en la mateno de la 8-a tago ni distancis de la Hidrologia Stacio Xiaota nur je 7 km, tion ni sciis sur la mapo. Jam lumiĝis la espero de venko. Kontraŭ la forta norda vento ni energie remis antaŭen. Post 4 horoj la riverujo fariĝis tute mallarĝa kaj profunda. Maldekstre de la rivero el artefarita kanalo 20 m larĝa fluis klara akvo, kiu kunfluis kun la malklara akvo de Hotan. La klara akvo fluis el la akvokonservejo en la supra baseno de la rivero Aksu.

La rivero zigzagas. Ambaŭflanke de ĝi staras vico post vico da poploj. Post 8-taga peniga ŝipveturado ni subite vigliĝis, vidinte la kulturitan poplaron.

Ni atingis la Hidrologian Stacion Xiaota! La stacio estas prizorgata de geedza paro. La edzo nomiĝas Cao kaj lia edzino Han. S-ino Han laŭdis nin: "Brave! Nia stacio aĝas jam 40 jarojn kaj ni neniam aŭdis, ke oni povas ŝipveturi ĉi tien en Hotan." Ŝi preparis por ni rizon kaj 5 pladojn. Ni kun ĝojo manĝis ĉe ili.

La 23-an de aŭgusto, ni komencis nian lastan vojaĝon. Dank' al la klara akvo el akvokonservejo, ŝipveturi la lastan distancon de 8 km en la dragita rivero por ni estis multe pli facile ol antaŭe. Je la 5-a horo ptm niaj kajakoj eniris en Tarim-riveron, kie la riverujo fariĝis multe pli larĝa. Hotan, fontante el la montaro Kunlun post sia longa vojaĝo en la vasta dezerto, finfine kunfluas kun Tarim, fontanta el Tianshan-monto. Nia ekspedicio atingis plenan sukceson. ■

FENESTRO DE MALNOVA DOMO

(Novelo)

de YU QIUYU

I
EN la vintro de la antaŭlasta jaro mia patrino diris al mi, ke ni neniel devis prokrasti vendon de la malnova domo en la hejmloko. Inter miaj gefratoj mi estis la plej obstina malaprobanto pri la vendo pro neklarigebla motivo. Sed la argumento de mia patrino estis nerefutebla: “La domo vakis dekojn da jaroj. Ĝi baldaŭ disfalos, se ni ne vendos ĝin. Vi tre ŝatas la malnovan domon, do vi loĝu tie kelke da tagoj por adiaŭi ĝin.”

La domo estis duetaĝa, konstruita de mia avo aŭ praavo. En malriĉa montvilaĝo la domo aspektis impone, kiel kastelo. Preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj portis la familian nomon Yu, kaj la domo fariĝis simbolo de honoro de la granda familio. Ĉi-foje mi kaj ĉiuj miaj gefratoj revenis al la hejmloko kaj ĉiu povis havi unu ĉambron. Mi okupis la saman ĉambron en la supra etaĝo, en kiu mi naskiĝis kaj kreskis. Jam hieraŭ la patrino dungis laborulojn kaj tiuj zorge purigis la domon.

Mistera estas la homa memoro. Pasis dekoj da jaroj, sed ĉiuj detaloj en la ĉambro konservitaj en la plej funda loko en la memoro tuj revigliĝis je mia enpaŝo en la ĉambron. Ĉiu vejno kaj ĉiu makulo sur la ligna muro strikte kongruis kun tiuj en mia memoro. Mi malvigle ĉirkaŭrigardis, palpis la muron lante moviĝante, kvazaŭ karesante mian korpon kaj mian animon.

Palpante, mi venis al la fenest-

tro. Ĝi estis mia okulo, tra kiu mi komencis observi la mondon. Kiam mia patrino rimarkis, ke mi kroĉiĝis al la fenestro tuttage, ŝi decidis anstataŭigi la pezajn lignajn fenestroklapojn per vitraj. La vitroj estis aĉetitaj en la gubernia urbo. Oni dufoje rompis la vitrojn survoje, kaj triafoje oni rompis la vitrojn dum enkadrigo. Nur kvarfoje oni sukcesis. De tiam la ĉambro fariĝis tute hela. Ekster la fenestro estis pajlaj kabanoj kaj kampoj, kaj iom pli fore kontinuo da montoj. Kaj en la infaneco mi ĉiam vivis kun imago pri la montaro. Sur la monto estis neklara vojeto, sur kiu moviĝis kamparanoj transportantaj brullignon. Sed kio estis trans la montoj? Ĉu bazaro, maro, templo, scenejo aŭ loĝejoj de dioj kaj diabloj? Ĝis nun mi ne iris trans la monton. Mi ne iros tien, alie rompiĝos la perfekta memoro de mia infaneco. Mi nur memoras ĉiun kurbon de la linio de la monteĝo. Se mi devus fari kurban linion ferminte la okulojn, la linio certe kongruus kun la linio de la monteĝo. Tio estas la unua kurba linio en mia vivo.

II

Tiuvespere mi enlitiĝis frue. Estis malvarme, la vilaĝo ne estis provizita per elektro, kaj en la eksterordinara kvieteco nenion mi povis fari krom dormi. La vata litkovrilo nove preparita kaj sunumita tutan tagon dissendis la vatan odoron. Sub la komforta litkovrilo mi sentis min fandiĝanta. “Eble mi havos sonĝon pri mia knabeco?” mi pensis, sed fakte nenian sonĝon mi havis. Mi vekig-

is el la dolĉa dormo tiam, kiam la hela lumo piketis miajn okulojn.

Kial tiel hele? Kun duonfermitaj okuloj mi rigardis eksteren tra la fenestro kaj vidis arĝentan montĉenon: dense neĝis en la nokto, kiam mi profunde dormis.

Subite rememoro vigliĝis en mia cerbo. Estis same kiel hodiaŭ. Mi estis kuŝanta en la lito, kun la okuloj fiksitaj sur la arĝente brilanta montĉeno. La patrino urĝis min ellitiĝi, ke mi devis iri al la lernejo. Sed mi pretekstis malvarmon kaj restis en la lito. La patrino nenion povis fari kontraŭ mi kaj rigardis eksteren tra la fenestro. “Jes, vi rigardu!” Ŝi subite ion montris per mansigno.

Laŭ la montrado de la patrino mi vidis, ke ruĝa punkto moviĝis sur la supro de la neĝa monto. Sur la plenplena fono de blanka neĝo la ruĝa punkto fariĝis pli okulfrapa. Tiu estis mia kunlernantino Heying, kiu loĝis trans la monto kaj nun estis iranta al la lernejo. Tiam mi estis sesjara kaj ŝi estis pli aĝa ol mi je dek jaroj. Sed ni ambaŭ estis lernantaj en la dua klaso. Ŝi havis sur sia kapo longan ruĝan kaptukon, donacitan de instruistino. La knabino devis ĉiumatene transiri la neĝan monton por atingi la lernejon, kaj la gepatroj kaj instruistinoj ne povis resti trankvilaj pri tio. Instruistino konsilis al ŝi porti la ruĝan kaptukon dirante: “Mi povos tuj vidi vin, kiam vi ĵus transiros la monton; kaj mi povos facile koni vin. Se vi falos, mi iros helpi vin.” La patrino de Heying tute aprobis la konsilon: “Tre bona ideo. Mi sekvos vin per la

okuloj, kiam vi iros sur la monton.”

Tiamaniere la vizitado de Heying al lernejo fariĝis iom solena. Kiam ŝi apenaŭ eliris el la vidkampon de la patrino, ŝi tuj falis en la observadon de la instruistino en la alia flanko de la monto. Ĉiutage la ruĝa punkto, gardata de la du virinoj, pilgrime moviĝis al la lernejo, en la librojn.

Tiun aranĝon multaj vilaĝoj sciis, tial ne nur du virinoj okulsekvis la ruĝan punkton. Mia patrino ĉiutage atendis la ruĝan punkton, por urĝi min ellitiĝi. La apero de la ruĝa punkto jam fariĝis sonorado por preparo en la lernejo. Kiam la ruĝa punkto aperis sur la montosupro, urĝo kaj hasteco leviĝis en la familioj, en kiuj estis lernantoj.

III

Tiutempe la knabinoj devis edziniĝi en la aĝo de 15 aŭ 16 jaroj. Unu jaron antaŭe la familio de Heying jam komencis preparadon por ŝia edziniĝo. Sed unu tagon antaŭ la edziĝofesto malaperis Heying. Du tagojn post tio, ĉe fenestro de klasĉambro aperis bela timema knabino kun haroj disfalantaj. Ŝi neniel volis foriri kaj petegis la instruistinon dungi ŝin. La instruistino iris al ŝi, karese metis manon sur ŝian ŝultron kaj levis ŝiajn harojn. Je tio ekbrilis la okuloj de la instruistino. “Sekvu min,” diris la instruistino. Ŝi kondukis la knabinon en la kabineton.

La lernejo sidis en forlasita monaĥinejo. En la lernejo estis pluraj belaj instruistinoj, ŝajne fraŭlinoj el bonhavaj familioj, fuĝintaj de kontraŭvola edziniĝo. Neniu el ili portis la familian nomon Yu. Ili voknomis la lernantojn nur per iliaj propraj nomoj, ĉar ĉiuj lernantoj havis la saman familian nomon. Escepto estis mia apudsidanto Migen, kiu havis la familian nomon Chen. Lia familio venis de alia loko.

Kiam Heying eliris el la kabineto, ŝi kaj kelkaj instruistinoj havis ruĝajn okulojn. Vespere, kiam finiĝis la lecionoj, la instruistinoj



ŝlosis la lernejon kaj transgrimpis la monton kune kun Heying, por persvadi ŝiajn gepatrojn. En la sekvanta tago Heying aperis en nia klasĉambro. Ŝi estis la dua lernanto, kiu ne portis la familian nomon Yu.

La sukcesa kaj rapida solvo de la afero restis enigmo por mi dum longa tempo. Fuĝo de edziniĝo estis granda afero en montvilaĝoj, kaj la gepatroj de fuĝintino devis respondi pri la okazaĵo. Ja ĉiuj noveloj kaj teatroj troige priskribis fuĝon de geedziĝo kiel herezan agon. Kiel la gepatroj de Heying povis permesi al ŝi rompi la geedzigan promeson kaj viziti lernejon? Mi kredis, ke tio rezultis el subita vizito de tiuj instruistinoj.

Kampanoj en montvilaĝoj preskaŭ dum la tuta vivo ne povis koni intelektulon, por ne paroli pri intelekta virino. Por fuĝi de milito, mia patrino venis de Ŝanhajo

en la kampanon. La kampanoj forte miris, ke ŝi povis legi diversajn librojn, skribi por ili leterojn kaj ekzameni aktojn. Pasis jam pluraj jaroj, sed multaj kampanoj ankoraŭ flustradis unu al alia post la dorso de mia patrino. Kaj mia patrino nur povis restadi en la “kastelo”. Kredeble tiuvespere vizito de multaj instruistinoj surprizis la gepatrojn de Heying, ke al ili venis tiom da elegantaj junulinoj el alia mondo, softe parolantaj en argumentoj tute fremdaj kaj nerefuteblaj. La gepatroj respektoplene akceptis ilin, prezentis al ili teon kaj obeeme kapjesadis en konfuziĝo. Fine ili ekbruligis torĉon kaj akompanis la instruistinojn ĝis ili transgrimpis la monton.

Oni diris, ke tiunokte multaj samvilaĝanoj eskortis la instruistinojn kune kun la gepatroj de Heying. En la akompanantaro estis eĉ

familianoj de la “edzo” de Heying. Multe da torĉoj formis brilan ĉenon sur la monto.

IV

Heying estis la unua lernantino en nia lernejo. Post ŝi en la lernejon venis pluraj knabinoj kaj nia klasĉambro fariĝis homoplena.

La instruistinoj ofte iris en la gubernian urbon por observi leciondonadon en norma lernejo kaj peti de la registaro subvencion por la lernejo. Ĉiufoje, kiam ili revenis de la gubernia urbo, ili faris ian novan aktivadon en la lernejo, kaj foje okazigis sportkunvenon.

Sed la lernantoj ne havis sportistan kostumon, kaj la instruistinoj lasis la infanojn sin vesti per pantaloneto kaj ĉemizo. En tiuj tagoj antaŭ la kunveno la infanoj jam kroĉiĝis al sia patrino, ke ŝi faru por ili la postulatan “kostumon”. En la tago de la kunveno, ekster la malaltaj ĉirkaŭmuroj de la lernejo kolektiĝis multe da kamparanoj-rigardantoj.

Enpaŝis la lernantoj en vicoj, kaj el ili la plej atentotira estis Heying. Ŝi jam estis junulino. Ŝia “kostumo” estis farita de ŝi mem, imite laŭ foto de sportistinoj en gazeto. La nigre blua kostumo strikte sidis sur ŝi, ke ŝi aspektis pli svelte. Kiam ŝi estis elpaŝonta, mi plurfoje rimarkis ŝian timidan mienon. De tempo al tempo ŝi malsuprentiris la pantaloneton, kvazaŭ ĝi povus longiĝi. Fine instruistino elpuŝis ŝin. Ĉe tio ŝrikis la surprizitaj rigardantoj. Post ŝrikado leviĝis zuma flustrado kaj fine ekregis silento. Heying levis la kapon, komencis barierkuradon, saltadon kaj pilkoĵetadon. Ŝi fariĝis fokuso de la sportkunveno, ĉar aliaj infanoj estis ankoraŭ naivaj kaj iliaj simplaj ludoj ne vekis vastan atenton. Ekster la ludkampostaris vico da instruistinoj, ĉiu en longmanika sportista jako aĉetita en la gubernia urbo. Sur ilia brusto pendis fajfilo, kaj sur ilia ĝoja vizaĝo legiĝis kuraĝigo. Post ili estis la kaduka korto de la monaĥinejo.

La sportkunveno rezultigis ka-

tastrofon. Tiam la virinoj en la vilaĝo ekhavis novan skoldon al siaj infanoj: “Ho, estu tiel frivola, kiel Heying!” Pluraj knabinoj ĉesis veni al la lernejo, kaj la knaboj estis ofte avertataj de la gepatroj kaj ili ne kuraĝis plu distriĝi kaj iri kune kun Heying. Grandaĝulo de la vilaĝo eĉ petis la instruistinojn eksigi Heying, ke la familio Yu ne ŝatis tian lernantinon. Kiam mia patrino aŭdis pri tio, ŝi longe silentis. Poste la patrino sendis inviti Heying al nia hejmo. Kiam Heying estis forironta, la patrino kaj mi akompanis ŝin ĝis la fino de la vilaĝo. Miris la vilaĝanoj, ĉar kutime mia patrino akompanis gastojn nur ĝis la pordo.

De tiam Heying rigardis min kiel sian propran fraton. Chen Migen estis mia bona kamarado, kaj nun ni tri ofte estis kune. Post lecionoj ni faris hejmtaskon triope en mia hejmo. Ni sidis sub la fenestro kaj la patrino helpis nin. La patrino ĝoje diris al mi: “Vi membroj de la familio Yu ne devas esti arogantaj. Ĉi tie ni kvar portas kvar familiajn nomojn.”

V

Kuŝante en lito, mi fiksas la rigardon sur la malproksima neĝa monto. Mi tre volis trovi ion sur la monto. Sed post longa tempo mi nenion trovis, nek la ruĝan punkton, nek alikoloran punkton.

Post ellitiĝo mi babilis kun mia patrino pri Heying. La patrino ankoraŭ memoris ŝin kaj diris al mi: “Informiĝu pri ŝi ĉe Migen. Mi aŭdis, ke li havas butikon.”

Chen Migen, mia bona amiko de dekoj da jaroj, estis vizitenda en mia tagordo. Antaŭtagmeze mi venis al lia butiko tuj apud la lernejo. Je la unua vido ni jam rekonis unu la alian. Li varme akceptis min. Post reciproka saluto li elprenis el ligna kesto du briketojn da sezama sukeraĵo, enmanigis ilin al mi kaj prezentis al mi teon. En la butiko ne estis seĝo kaj ni interparolis starante. Subite li strange ekridis kaj flustris al mi: “Mi diru al vi la veron. Estas mia filo, kiu intencas aĉeti vian domon.

Mi mem ne partoprenis en la negoco konsiderante, ke via patrino hezitos en la postulo de prezo, kiam ŝi scios, ke mi estas aĉetanto. Pardonon, ke mi ekŝatis vian domon jam en la knabeco, kiam mi faris hejmtaskon kune kun vi en via hejmo. Kiel bone estis, ke antaŭ dekoj da jaroj via patrino jam vitris la fenestron de la domo. Mi aŭdis, ke ŝi sukcesis nur en la kvara fojo.”

Estis malfacile daŭrigi la interparoladon pri tiu temo kaj mi ĝentile interrompis lian paroladon kaj demandis pri Heying. Li diris: “Kiel afabla vi estas, ke vi ankoraŭ memoras ŝin! La virinoj en montvilaĝo estas destinitaj por fari pezajn laborojn. Ŝi naskis armeon da infanoj kaj nun vivas sola pro malakordo inter si kaj la bofilinoj. Ŝi jam tute maljuniĝis. La antaŭlastan jaron mi vizitis ŝin, sed ŝi jam forgesis mian nomon.”

Jen kelke da vortoj pri la stato de miaj du plej bonaj amikoj en mia knabeco.

Mi forlasis la butikon kaj post kelke da paŝoj mi jam vidis la pordon de la lernejo. Estis vintraj ferioj kaj la lernejo estis ŝlosita. Mi ĉirkaŭiris la lernejon laŭ la muroj kaj foriris. Hejmenreveninte, mi diris al la patrino, ke mi volas foriri en la sekvanta tago. La patrino diris en melankolio: “De nun vi ne revenos ĉi tien. La domo baldaŭ estos vendita, kaj nia branĉo de la familio Yu devas migri.”

VI

La sekvantan matenon mi ankoraŭ rigardadis la neĝan monton kuŝante sub litkovrilo. La malaperinta ruĝa punkto fariĝis tiel malproksima kaj tiel abstrakta. Ĉu la ruĝa punkto estas la efemera Haleja kometo?

Kiel nebulo, leviĝis en mia memoro versoj verkitaj de iu formigrinta poeto pri la Haleja kometo:

*Senĉese vi kuregas en tragedio
de merito,
Flirtigante survoje longan flagon
de pilgrimanto.*

EN FOIRO DE FLOROJ

Fotoj de LI CHUNGENG


Marte, en Chengdu, la ĉefurbo de Sichuan-provinco, prosperas diversaj floroj. Ĉiujare, en tiu ĉi tempo ĉ. ducent mil vazoj kun freŝaj floroj ornamas la parkon Qingyanggong en la urbo. Tiam en la parko okazas ekspozicioj de kaligrafajoj, pentraĵoj kaj popolaj metiartaĵoj, prezentiĝas lokaj teatraĵoj kaj vendiĝas lokaj produktaĵoj, bongustaj etmanĝaĵoj kaj miniaturaj envazaj pejzaĝoj. Ĉio ĉi faras grandan spektaklon.



Interesataj vizitantoj por kaktoj

Farado de dolĉaĵo





Klientoj de floroj

Standoj de bambuaj metiartaĵoj



Subakva arkeologio de Ĉinio

EN 1985, en la Sudan Ĉinan Maron enŝteliĝis alilanda levŝipo, elakvigis ĉinan kargoŝipon dronintan antaŭ 235 jaroj, kaj el la ŝipo akiris grandan kvanton da altvaloraj antikvaj porcelanaĵoj kaj 125 briketojn da oro. Tiuj antikvaĵoj estis aŭkciitaj en la aŭkcio Kristi en Nederlando, je la prezo de 20 milionoj da usonaj dolaroj.

La ĉinoj doloris pro tio, ke ili ne povis protekti siajn subakvajn antikvaĵojn. Nelonge post tio, Ĉinio oficiale starigis akordigan grupon pri subakva arkeologio, kaj en 1989 publikigis "Protektan kaj


Administran Regularon por Ĉinaj Subakvaj Antikvaĵoj".

Cetere, la Ĉina Historia Muzeo starigis esploran oficejon de subakva arkeologio kaj komencis eldoni "Bultenon pri Subakva Arkeologio". Printempe de 1989, la unua ĉina trejna grupo de subakva arkeologio estis fondita de la Ŝtata Antikvaĵo-protekta Buroo en Qingdao. La junuloj estis trejnitaj je subakviĝo, teorio de subakva arkeologio, esplora prifosado de subakva arkeologio, mapodesegnado, fotado, manipulado de komputoro. 15 el ili fariĝis subakvaj arkeologoj de la unua generacio de Ĉinio.



Antikvaj ĉinaj porcelanaĵoj elakvigitaj en la maro ĉe Suizhong

Submara laboro



Arkeologoj observantaj elakvigon per monitoro



MEM PROUVU

KURACA EFIKO DE VINA- GRO KUN DISBATITA OVO

Mi multe suferis de sendormeco kaj patela sprono malgraŭ medicinaĵa kuraco. Poste, ĉiumatene antaŭ manĝo mi trinkis vinagron kun disbatita ovo kaj la malsanoj ege mildiĝis.

La metodo de preparo de tia trinkaĵo: Trempi unu lavitan kokovon en bokalo kun 150-180 mililitroj da vinagro, disbati la ovon post 48 horoj kaj trempi ĝin en la bokalo pliajn 36 ho-

rojn. Kaj tiam la trinkaĵo estas pretigita.

POR SENDOLORIGI LA DENTOJN

En varma somero mi havas la kutimon ĝui trinkaĵon aŭ akvomelonon konservitan en fridujo. Post longa tempo miaj dentoj fariĝis nesensivaj kaj eĉ forte doloris min. Hazarde, mi gargaris min per malvarma teakvo kaj tuj kvietiĝis la doloro. Nun mi ofte gargaras min per tia akvo.

KIEL PURIGI TAPIŜON?

Por forigi la polvon sur tapi-

ŝo, oni ĝenerale uzas polvosuĉilon. Krom tio, mi proponas pli simplan metodon, t.e. enverŝi klaran akvon en pelvon kaj aldoni al la akvo iom da parfumo, trempi balailon en la miksaĵo kaj purigi la tapiŝon per la balailo. Per tio vi povas ne nur forigi la polvon sur la tapiŝo, sed ankaŭ humidigi la aeron en la ĉambro.

POR AKRIGI LA KLINGON DE RAZILO

Antaŭ ol uzi razilon, trempu ĝin en varma akvo por momento. Tiam ĝia klingo fariĝas multe pli akra.

Dank' al la longa marbordo, multaj insuloj kaj vasta maro, deantikve, ŝipfabrikado kaj martransportado prosperis en Ĉinio. Laŭ la analizo de specialistoj, en la maroj de Ĉinio kuŝas almenaŭ 2 000 dronintaj ŝipoj. La junaj ĉinaj subakvaj arkeologoj decidis prifosi la gigantan trezoron per ilia saĝeco kaj braveco.

Novembre de 1989, la Ĉina Historia Muzeo kaj esploro de japana universitato de subakva arkeologio kune faris serĉadon de ŝipo N. 1 subakviĝinta en la Suda Ĉina Maro ĉe Guangdong-provinco. Malgraŭ la malbonaj klimato kaj cirkonstancoj de la akvo, la arkeologoj de la du landoj faris serĉadon 11 fojojn, lokalizis la dronintan ŝipon kaj akiris la cirkonstancajn materialojn de la loko de la ŝipo. Tio metis bazon por plua laboro.

Printempe de 1990, la grupo venis al Dinghai-vilaĝo de Lianjiang(Ljangĝjang)-gubernio de Fujian(Fuĝĝjan)-provinco, kie la arkeologoj esploris kaj prifosis la ruinon "Blanka Rifo". Sur la marfundo, ili vidis bovlojn renversite kuŝantaj sur la fundo kaj pladojn falintajn en fendojn de ŝtono. Ili difinis 12 esplorajn terenojn ĉiu je 2 m. longa kaj je 2 m. larĝa. Sur tiuj areoj ili faris surfacan kolektadon, fotadon kaj mezuradon. Fine ili elakvigis 525 pecojn da blublankaj porcelanaĵoj produktitaj en Song- kaj Yuan(Jŭan)-dinastioj (960-1368 p.K.) en Fujian-provinco.

Poste, la grupo laboris multloke en la maroj de Ĉinio.

Laŭ la raporto de la antikvaĵo-protekta departemento de Suizhong-gubernio de Liaoning-provinco, en majo de 1991, la departemento akiris 584 pecojn da Yuan-dinastiaj porcelanaĵoj elakvigitaj de fiŝ-

istoj dum ilia fiŝkaptado. La informo certigis, ke tie estis droninta plensarĝita kargoŝipo.

Oktobre de 1991, la grupo de subakva arkeologio faris unuan serĉadon de la ŝipo. Ili trovis porcelanan poton kaj lignan tabulon de ŝipo. Laŭ analizo per C14, la tabulo aĝis 660 — 820 jarojn, samkiel la elakvigitaj porcelanaĵoj.

La 13-an de junio de 1992, la grupo komencis sian 50-tagan duafojan subakvan serĉadon. Ili mezuris la ĉirkaŭan terenon de la ŝipo por lokalizi ĝin. Poste ili faris mezuradon kaj kolektadon sur la ŝipo.

Ili trovis 5 esplorindajn punktojn kaj tuj numerigis ilin. La 16-an de julio, la labor-ŝipo de la grupo veturis al la loko kaj haltis sur la punkto N. 2. La subakvistoj tuj vidis blankan pelvon kun nigra desegnaĵo. Plue, ili trovis multajn porcelanaĵojn sporade kuŝantaj sur la marfundo. Ĉifoje ili elakvigis 5 pecojn el ili.

Malgraŭ restado de ĉ. 800 jaroj en maro, la delikataj porcelanaĵoj ankoraŭ briletis, dum la ŝipon jam tegis tavolo da malmola koagulaĵo de maraj vivaĵoj. La subakvistoj deprenis pecon de la giganta solidaĵo, metis ĝin en speciala likvaĵo por forigi la tegaĵon. Meze de la peco estis porcelanaĵoj. Post mezurado oni sciis, ke la kargoŝipo plenplena de porcelanaĵoj kuŝis sur la ebenaĵo inter du sablaj dunoj. La ŝipo longis je ĉ. 21 m, kaj larĝis je ĉ. 7 m. Sur kaj ĉirkaŭ ĝi oni kolektis 47 pecojn da porcelanaĵoj, senescepte produktaĵoj de Cizhou, fama antikva porcelana urbo en Hebei-provinco. La elakvigo de la tuta ŝipo bezonos 3-5 jarojn. Sed la unuapaŝa sukceso en esploro kaj kolektado instigis la ĉinajn junajn subakvajn arkeologojn al nova strebado. ■

ŜANĜIĜO EN LA ĈINA KAMPARO

Nun la socia reformado kun industriigo kaj urbigo kiel la ĉefa enhavo ŝanĝas la fizionomion de la ĉina kamparo en ĉiuj flankoj.

A. La migrado de granda nombro da laboruloj rompis la situacion de separatisma kontrolado de regionoj kaj urboj kaj rapidigis la paŝojn de la kamparo al modernigo. En la pasinta jaro pli ol 70 milionoj da kamparanoj forlasis la kamparon, kio vaste influis la socian ekonomion: Reduktiĝis la premo pro manko de kampoj en la kamparo kaj malgrandiĝis la malfacileco en la reguligo de la industria strukturo kaj tiu en la efektiviĝo de skala entreprenado; evidente pliiĝis la enspezo de familioj de elmigrintaj kamparanoj; kaj estis pli vaste subtenata la ekonomia disvolviĝo de urboj kaj ĉemaraj regionoj. La socia ŝanĝiĝo pro la supraj fenomenoj akcelos la unueciĝon kaj modernigon de la ĉina socio.

B. La aranĝo kun vilaĝaj entreprenoj kiel la ĉefa sektoro de la kampara ekonomio jam havas fundamentan formon. De januaro ĝis aŭgusto de 1993 la produkta valoro de la vilaĝaj entreprenoj pliiĝis je 74.1% kompare kun tiu de 1992 kaj la nombro de laborricevintoj superis 100 milionojn; rimarkinde kreskis brutobredado kaj produktado de fiŝoj kaj fruktoj; kaj la produktokvanto de greno, kotonoj kaj kuir-oleo iom reduktiĝis aŭ restis sensanĝa.

C. La merkata reguligo de agrikulturaj produktaĵoj puŝos novan grupiĝon de la riĉfontoj inter regionoj kaj regionecon kaj specialigitecon de agronomio, ke fine rompiĝos la interregiona blokado kaj aperos la situacio de granda merkato kaj cirkulado en granda sfero. La tendenco de la ŝanĝiĝo estas, ke denove grupiĝos ĉefaj produktaĵoj de greno, kotonoj kaj aliaj ĝenerale kulturataj plantoj kaj aperos nombro da produktaĵoj de agrikulturaj plantoj kun lokaj avantaĝoj kaj trajtoj; plirapidiĝos la laŭregiona kaj specialigita produktado de agrikulturo kaj en kelkaj jaroj aperos regiono de sojfaboj en nordorienta Ĉinio, regiono de tritiko kaj maizo en norda Ĉinio, regiono de rizo en la baseno de Yangzi-rivero kaj regiono de fruktoj en montetaroj.

Ĉ. Estas novigita la sistemo de la kampara proprieto. Plifirmiĝis la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado. La limtempo por laŭkontrakta kulturado longiĝos, kaj la kamparanoj povas okupiĝi pri industrio kaj komerco, kaj ĉio ĉi trankviligas la kamparanojn. Nun la investado por la kampoj estas farata pli racie. Kaj plie, la vilaĝaj entreprenoj praktikas la akcian sistemon kaj la akcia-kooperan sistemon en pli kaj pli granda skalo. Ĉio supre menciita montras, ke la kamparo estas jam liberigita de la antaŭa tute publika proprieto.

LA PLEJOJ DE LA MONDO SUR LA ĈINA TERITORIO

Aŭguste de 1993, okazis en Pekino la Unua Ekspozicio de Ĉinaj Mapoj. Sur iu giganta mapo montriĝas 22 plejoj de la mondo sur la ĉina teritorio. Ili estas:

La plej longa muro de la mondo — la Granda Muro;
La plej antikva vojo por komerco inter Oriento kaj Okcidento — la Silka Vojo;

La plej granda urbo ĉirkaŭita de muroj — la Ŝtona Urbo Nankino konstruita en Ming-dinastio (1368-1644);

La plej alta signalturo de la mondo por la norda tropiko — la Signalturo de la Norda Tropiko en Conghua de Guangdong-provinco;

La plej norda rizkultivejo de la mondo — Humagubernio de Heilongjiang-provinco;

La plej fama river-tajdo de la mondo — la tajdo de Qiantang(Ĉjantang)-rivero;

La loko, kie falis plej densa pluvo da aerolitoj — Jilin(Ĝjilin)-provinco;

La plej frua kluz-kanalo de la mondo — Lingqu-kanalo de Guangxi;

La plej longa kanalo de la mondo — la Granda Kanalo inter Pekino kaj Hangzhou;

La rivero kun plej multe da sablo en la mondo — la Flava Rivero;

La plej alta rivero de la mondo — Yarlung Zangbo en Tibeto;

La plej alta sala lago de la mondo — la lago Nam Co en Tibeto;

La montaro kun plej multaj pintoj en la mondo — Himalajo;

La plej alta agrikultura regiono de la mondo — Tibeto;

La dezerto kun plej granda areo de moviĝantaj sablo-montetoj en la modno — Taklimakan;

La plej malalta baseno de la mondo — Turpanbaseno en Xinjiang (Ŝinĝjang);

La plej granda niveldiferenco sur la kontinento de la mondo — diferenco inter la alto de Qomolangma (8 848.13 m super la marnivelo) kaj tiu de la lago Aydingkol (155 m sub la marnivelo);

La loko kun plej multaj lafoj de la mondo — regiono de Guangxi, Guizhou kaj orienta Yunnan;

La plej granda leŭsa regiono de la mondo — la Leŭsa Altebenaĵo;

La plej alta montpinto kaj plej aero-manka loko de la mondo — Qomolangma;

La plej alta kaj plej juna altebenaĵo de la mondo — la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo;

La loko kun plej alta kaj plej granda grupo da altebenaĵaj lagoj de la mondo — la Nord-Tibeta Altebenaĵo.

MANĜBASTONETO KIEL ARTAĴO

Kiam la kulinara arto de Ĉinio ĝuas famon tra la mondo, alilandaj turistoj aĉetas en Ĉinio manĝbastone-

tojn kiel memoraĵojn kaj donacojn.

En la antikveco oni manĝis per arbobranĉoj aŭ bastonetoj anstataŭ manoj. Kun la disvolviĝo de produktado kaj civilizacio manĝbastonetoj estis beligitaj. Ĝenerale, estas du specoj da manĝbastonetoj: la ĉinaj kaj la japanaj. La supra parto de ĉinaj manĝbastonetoj estas dikaj kaj la malsupra parto havas ebenan finon, dum la supra parto de japanaj manĝbastonetoj estas pli dika ol tiu de la ĉina kaj la malsupra parto havas pintan ekstremon. La infanaj manĝbastonetoj longas je malpli ol 22 cm.

Nun estas manĝbastonetoj lakitaj, lignaj, bambuaj, ostaj, eburaj k.a. Ostaj manĝbastonetoj estas faritaj el ostoj kamela, bova, elefanta kaj cervaj. La ostaj manĝbastonetoj havas sur si diversajn desegnojn. Altvaloraj estas eburaj manĝbastonetoj.

Ankaŭ arĝentaj, jadaj kaj klozoneaj manĝbastonetoj estas tre valoraj.

Por familia uzo oni elektas manĝbastonetojn en ŝatataj koloro kaj kvalito kaj ĉiu el la familio devas uzi siajn proprajn manĝbastonetojn. Kiam okazas festeno, oni devas uzi delikatajn manĝbastonetojn por konformigi ilin al la kvalito de la festeno. Kaj krome oni devas ankaŭ prepari komunuzajn manĝbastonetojn belajn kaj fajnajn.

ĈINSTILAJ ĜARDENOJ EKSTER ĈINIO

La ĉinstilaj ĝardenoj en urboj ekster Ĉinio estas tre ŝatataj de la tieaj loĝantoj. Ĉi-sube ni konigas tri el ili.

Suzhou-stila ĝardeno en Usono En Manhattan de Nov-Jorko estas Suzhou-stila ĝardeno Mingxuan (Mingsjüan) kun kalkitaj muroj, pavilonoj, koridoroj kaj rokaĵo el Taihu-ŝtonoj akireblaj nur ĉirkaŭ la lago Taihu. En la basenoj naĝas fiŝoj el Suzhou. Rigardante ilin, la vizitantoj sentas sin kvazaŭ en Suzhou.

Ĉinstila oceana parko en Nederlando Ĝi montras turismajn lokojn de Ĉinio kaj sidas sur du bargoj altaj je tri etaĝoj en la turisma loko de Roterdamo. La parko kovras 5 500 kvadratajn metrojn, investita kune de s-ro Sun, la ĉina direktoro de la Ĉina-Nederlanda Komerca Kompanio, kaj la Ĉina Nacia Kompanio de Oceana Transporto kaj la Ĉina Nacia Kompanio de Ekstera Komerco kaj Transporto. En ĝi estas kioskoj, longa koridoro, rokaĵo, endoma ĝardeno, amuzejo kaj restoracio.

Ĉinstila parko en Ĉilio En O'Higgins-parko de Santiago estas ĉinstila parko, kiu kovras 3 000 kvadratajn metrojn kaj estas delikate strukturita. La insuleto en ĝi estas ĉirkaŭita de akvo en tri flankoj. Ĝi estas brakumita de diversformaj montpintoj en nebulo kaj frontas kontraŭ fera pordo apoganta sin sur granda arbo. Sur ĝi pendas tabulo kun skribo "Ĉina Parko". Enirinte la pordon, oni iras supren laŭ la ŝtuparo kaj povas vidi desegnitan arkaĵon 5-metre altan. Antaŭ la arkaĵo sidas du ŝtonaj leonoj faritaj en Taiwan kaj kreskas ĉielskranta deodaro el Himalaĵo. Sur la insuleto kreskas akacioj, cedreloj, morusarboj kaj paŭlovnioj (*Paulownia*) el Ĉinio.

Atenton!

- La poŝtĉekkonto de nia peranto Flandra Esperanto-Ligo estas: 000-0265338-43. La revuo "El Popola Ĉinio" abonebla ĉe la Ligo per la nomita konto.
- Nia peranto Eldonejo & Librejo Sonorilo akceptas abonon kaj mendon per la kreditkarto VISA, EUROCARD, MASTERCARD, ACCESS aŭ AMERICAN EXPRESS. Sciigu simple per subskribita karto aŭ telefaksa letero la nomon, numeron kaj validodaton de la kreditkarto. Adreso: Doornstraat 22, 2610 Wilrijk, Belgio. Telefakso: 03-827 24 05.

la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

Abonu ĉe via
UEA-kotizperanto aŭ
petu provekzempleron
kontraŭ unu internacia
respondkuponon ĉe TEJO,
Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam,
Nederlando.



EKONOMIO

● Pro reguligo de la interna strukturo de terkulturado de la ŝtataj farmejoj de Ĉinio, en 1993 disvolviĝis pluen la ĉina agrikulturo. La totala produktokvanto de greno kaj sojfaboj atingis 10.87 milionojn da tunoj kaj refoje superis la rekordon de 10 milionoj da tunoj. La totala produktokvanto de kotono atingis 400 000 tunojn kaj tiu de natura kaŭĉuko — 269 500 tunojn. La jara totala socia produktovaloro estis je 15% pli granda ol en 1992.



La kontenerizita transŝarĝejo de la fervoja stacio de Xi'an

● Dank' al la reformado kaj pordomalfermo, rapide disvolviĝis la kontenera fabrikado de Ĉinio. En 1989 Ĉinio produktis pli ol 30 000 internacie normajn kontenerojn kaj en 1992 la produktokvanto jam atingis 187 700. Ĉinio povas produkti internacie normajn fridigajn, potoformajn, fervojajn kontenerojn kaj plurfunkciajn kontenerojn por teni lozan cementon.

● La Centra Oficejo por la Ĉina Regiono de Citibanko, la plej granda internacia banko de Usono, translokiĝis de Hongkong en Ŝanhajon antaŭ nelonge. Estis la unua fojo, ke centra oficejo por la ĉina regiono de alilanda banko translokiĝis en la ĉeferon de Ĉinio en la pasintaj 40 jaroj.

● La eksterordinare granda vinbero, kulturita de Jiang Wenbin (Ĝjang Ŭenbin), estro de la Wujiang-a Vinbera Instituto de Jinhua (Ĝinhŭa), Zhejiang (Ĝeĝiang)-provinco, estis notita en la Guinness-an Libron de Mondaj Rekordoj. La diametro de tiu ĉi purpura-nigra vinbero longas 4.6 centimetrojn. Ĝi pezas 36 gramojn.

● Por mildigi la polucion de la restaĵoj de blanka plasta membrano, vaste uzata en la agrikultura produktado, ĉinaj fakuloj studas pri la tekniko por produkti sun-malkomponan plaston.

La sun-malkompona membrano, produktita de

Ĉinio, estas utila por mildigi la polucion kaj kreskigi agrikulturajn plantojn. Ĝi povas rivali kun tiu de Usono, Kanado kaj aliaj landoj. La membrano povas esti vaste uzata en lokoj, kie sterniĝas vastaj kampoj kaj forte brilas la suno.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La Esplora Centro pri Spaca Scienco kaj Ĝia Apliko sub la Ĉina Akademio de Sciencoj ellaboris serion da planoj pri sondo de la kosmospaco, kaj lanĉi la artefaritan sateliton "Praktiko n-ro 4" en 1994 estas grava konsistiga parto de la planoj. La satelito kun ses sondiloj ene faros ĉioampleksan sondadon al la elektraj korpuskloj en la spaco, proksime de la tero, kaj iliaj efektoj. Koncernaj laborantoj atingis la lanĉejon de artefarita satelito en Xichang (Ŝjiĉang), Sichuan, Ĉinio.

● Lastatempe la Shanxi(Ŝanŝji)-a Karbo-kemia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj sukcese faris la eksperimenton por produkti benzinon el karbo.

Laŭ la datenoj donitaj de la eksperimento, la provinco konstruos fabrikon kun jara produktokvanto de 50 000-100 000 tunoj da benzino. Pro tio Ĉinio fariĝos unu el la malmultaj landoj, kiuj povas produkti benzinon el karbo.

● La supera inĝeniero Wang Zhenliang (Ŭang Ĝenljang) de la Ĉina Ministerio de Agrikulturo inventis novan teknikon. Ne difektante la uzvaloron de bambuo, li multfoje eltiris sukcon el la viva bambuo kaj prilaboris el ĝi trinkaĵon. La tekniko estas eksperimentita de la ŝtato.

Bambusuko entenas konstantan kvanton kaj mikrokvanton da elementoj bezonataj de la homa korpo, nome, vitaminoj, 15 disociaj aminoacidoj kaj polisakaridaj elementoj. Ĉinio havas kvar milionojn da hektaroj da bambuoj kun jara produktokvanto de 150 milionoj da tigoj.

● Lastatempe la Wuhan-a Politekniko de Desegno kaj Mezurado en Hubei-provinco rikoltis du scienc-teknikajn fruktojn, kiujn oni nomas okuloj por esplori polusan regionon.

La unua frukto estas satelita bildo en skalo de 1:200 000, kiu prezentas la regionon 40 kilometrojn respektive de ambaŭ flankoj de la orienta longitudo de 76°30' en la antarkto. La bildo klare figuras neĝajn montetojn, glaciajn ravinojn, rokojn, lagojn kaj maron. La alia estas topografio de Lasman-regiono en la antarkto, en skalo de 1:10 000. Kiel la unua topografio de la antarkto, ĝi precize konigas la situon de la loko kun areo de 200 kvadrataj kilometroj apud Zhongshan-stacio de Ĉinio.

● La Pekina Observatorio sub la Ĉina Akademio

de Sciencoj informis, ke iu nove trovita kometo frapos la dorson de Jupitero la 20-an de julio 1994. Tiam oni vidis la plej grandan eksplodon okazintan unuafoje en la suna sistemo.

Laŭ la orbito de tiu kometo, astronomoj antaŭkalkulis, ke post la frapado eble sur Jupitero aperos granda ŝtormo, simila al ĝia ruĝa makulego, kaj ĉirkaŭ ĝi vidiĝos lumringo kaj haloo.

KULTURO

- La "Granda Angla-Ĉina Vortaro" kompilita de Ĉinio mem enhavas 200 000 artikolojn, kun 14 apendicoj kaj 16 milionoj da vortoj. La vortaro estas laŭdata de en- kaj eksterlandaj uzantoj. Ĝi estas uzata ankaŭ de la Traduka Fako de UN.

SPORTO

- En 1993 Ĉinio gajnis sume 102 mondajn ĉampionecojn en 17 sportobranĉoj kaj superis la plej altan rekordon en la historio, kreitan en 1991, en kiu Ĉinio gajnis 93 mondajn ĉampionecojn.

En la lasta jaro 31 sportistoj kaj sep teamoj de Ĉinio 103-foje kreis 54 mondajn rekordojn, je 12 pli multe ol en 1992. 1993 estis jaro, en kiu ĉinaj sportistoj kreis plej multe da mondaj rekordoj post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949. Ses sportistoj kaj unu teamo 10-foje kreis ses rekordojn de la Olimpiaj Ludoj. Tio estas senprecedenca.

TURISMO

- En la 18-a de decembro 1993 finkonstruiĝis la parko Bela Ĉinio en la ĉirkaŭurbo de Kissimnee de Usono.

La parko, kun areo de 300 000 kvadrataj metroj, havas 55 modelojn de famaj kaj miniaturaj vidindejoj de Ĉinio, faritajn en proporcio de 1:1 ĝis 1:15, inter kiuj estas la Imperiestra Palaco de Pekino, Granda Muro, Potala-palaco de Tibeto, Granda Budhostatuo de Leshan, Dunhuang-a Ŝtonkavernaro, ĝardenoj de Suzhou, Okcidenta Lago de Hangzhou k.a. En la parko, krom teatro kun pli ol 1 000 sidlokoj, estas ankaŭ specifaj teatroj en iuj vidindejoj. Pli ol 130 artistoj kaj metiistoj el Ĉinio prezentis tie por vizitantoj.

- La 18-an de decembro 1993, la usona eldonisto s-ro Aksen vizitis Pekinon kune kun la Orienta Turisma Grupo de Usono kaj fariĝis la dumiliona alilanda turisto, kiu vojaĝis en Pekino en la jaro.

Post kiam franca emerito s-ro Desmoulin fariĝis la miliona alilanda turisto, kiu vojaĝis en Pekino en 1987, la nombro de la alilandaj turistoj akceptitaj en Pekino kreskis de miliono al du milionoj.



S-ro Aksen en Pekino

MEDICINO

Por efike preventi seksan malsanon kaj aideson, lastatempe en Ĉinio fondiĝis la koncerna asocio kun la tasko helpi la registaron organizi diversfakajn personojn por partopreni la preventadon, sanigan edukadon kaj akademian interŝanĝon inter en- kaj eksterlandaj fakuloj.

Oni diris, ke en Ĉinio estas 1 159 aidesaj suferantoj kaj kontaĝitoj. 14 el ili jam mortis. La suferantoj vivas en 22 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj. Plejparto el ili estas toksigemuloj kaj revenintoj el aliaj landoj.



Konsultiga aktivado por prevento de aideso

SOCIO

- De nul horo de la 1-a de decembro 1993, la pekina magistrato malpermesas flamigi fajraĵojn kaj eksplodigi krakfajraĵojn en la urboparto de Pekino kaj ĝia proksima ĉirkaŭurbo.

En 1986 la pekina magistrato ellaboris la "Reguloj pri sekura administrado de fajraĵoj kaj krakfajraĵoj en Pekino" kaj en 1987 ĝi prezentis la administran politikon "limigi kaj fine malpermesi" la flamigon de fajraĵoj kaj eksplodigon de krakfajraĵoj. La enketo al 80 000 urbanoj montras, ke 84.6% de ili aprobis la malpermeson.

Yan Jiaxian, kolektanto de tuĉfrotujoj

de LI QIANG



S-ro Yan Jiaxian

LAŬ tradicio ĉinaj ideogramoj estas skribitaj per tuĉpeniko kaj ĉina inko, kaj ankaŭ ĉinaj tuĉdesegnoj estas pentritaj per ĉina inko, tial oni devas uzi tuĉfrotujon. La tuĉfrotujo, ŝĵuan-papero, tuĉpeniko kaj ĉina inko estas nomataj kvar trezoroj de la legoĉambro. Ili estis nemalhaveblaj por la antikvaj ĉinaj instruituloj kaj necesas ankaŭ por la nunaj ĉinaj kaligrafoj kaj pentristoj.

En Ĉinio troviĝas multaj kolektantoj de tuĉfrotujoj. Unu el ili estas 60-jara Yan Jiaxian (Jan Ĝjaŝjan). En la pasintaj 40 jaroj li kolektis pli ol 200 valorajn tuĉfrotujojn kaj fariĝis fama kolektanto, aprezisto kaj esploristo de tuĉfrotujoj en Ĉinio.

S-ro Yan Jiaxian estis membro de la Ĉina Kaligrafa Asocio. Li diris, ke oni povas koni la historion de la tuĉfrotujo laŭ ĝiaj formo, materialo kaj epigrafo kaj ankaŭ ĝian rolon ludatan por la ĉina skriba kulturo kaj la civilizacio de la ĉina socio.

En la legoĉambro de s-ro Yan ĉie estas grandaj kaj malgrandaj skatoloj kun tuĉfrotujoj ene. El ili estas plej antikva tuĉfrotujo diskoforma kaj tre maldika. Ĝia fronto estas glata kaj uzata por froti ĉinan inkon, dum la dorsa flanko

malglata. Tiu ĉi tuĉfrotujo estas valorega objekto por studi la historion de la tuĉfrotujoj.

S-ro Yan elprenis dekelkajn antikvajn tuĉfrotujojn, vicigis ilin laŭ la datoj de farado kaj konigis al mi iliajn karakterizaĵojn.

La brikforma tuĉfrotujo de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.- 23 p.K.) estas tre simpla, kun malprofunda inkkaveto sur ĝi. La rektangula duflanka tuĉfrotujo de Tang-dinastio (618-907) portas la nomon Santang-Umeffloro pro tio, ke ĝia inkkaveto estas gravurita en formo de umefloro. La ekonomia kaj kultura prospero de Tang-dinastio multe evoluigis la faradon de tuĉfrotujoj. La tiamaj tuĉfrotujoj estis faritaj el bonkvalitaj ŝtonoj kaj en diversaj formoj, kaj sur la tuĉfrotujoj vidiĝis delikate gravuritaj desegnoj.




Du pezaj rektangulaj tuĉfrotujoj, kun kanalforma kaveto, gravuritaj desegnoj ĉe la randoj kaj epigrafoj sur la dorso, estas faritaj en Song-dinastio (960-1279). Alia rektangula tuĉfrotujo, senranda kaj makuloplana, estas produktaĵo de Yuan-dinastio (1271-1368). La tuĉfrotujoj de Song- kaj Yuan-dinastioj evoluis el la sama origino de tiuj de Tang-dinastio. Ili distingiĝis per sia eleganteco. Sed en la periodo oni jam akcentis gravuradon por fari tuĉ-


frotujojn.

En Ming- kaj Qing-dinastioj (1368-1911) prosperis la tuĉfrotuja metiarto. La tuĉfrotujoj iom post iom fariĝis metiartaĵoj kaj la instruituloj aprezis kaj kolektis ilin. La tuĉfrotujoj de Ming- kaj Qing-dinastioj estis faritaj pli delikate kaj havis sur si pejzaĝon, figuron de historia persono kaj belskribon. Tiam estis uzataj diversaj teknikoj de gravurado, kiel ekzemple, reliefigo, enkavigo kaj tridimensia gravurado.

En 1736-1795, kiam regis imperiestro Qianlong de Qing-dinastio, la disvolviĝo de tuĉfrotujoj atingis sian kulminon, ĉu en uzado de materialo, ĉu en gravurado, ĉu en desegnado. Imperiestro Qianlong tre ŝatis tuĉfrotujojn. Li laborigis plej bonajn metiartistojn en la kortego kaj ordonis ilin gravuritan manskribon sur tuĉfrotujo. Historia libro diras, ke estis sume ses specoj da formoj, ĉiu kun tri malsamaj epigrafoj, sume 18 specoj da tuĉfrotujoj. La imperiestro premiis korteganojn per tuĉfrotujoj. La premioj rigardis ilin kiel rarajn. Estas mirinde, ke s-ro Yan havas sep el ili post penado dum dekoj da jaroj.

La tuĉfrotujoj, kolektitaj de s-ro Yan, estas, krom ŝtonaj, ankaŭ porcelanaj kaj fajencaj. Li esploris ĉiujn siajn tuĉfrotujojn kaj verkis multajn disertaĵojn, kia "Aliaj Nomoj de Tuĉfrotujoj". ■





Wuyi-monto

Foto de LI CHUNGENG

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九四年第四期

(本刊代号:二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2

